


La Mondo antaŭ 1492



# Esperanto sub la Suda Kruco

Julio-Aŭgusto 2001  
Numero 52 (vol. 9, no. 4)



ISSN 1039-9380

# Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralio kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

Numero 52 (volumo 9, numero 4), Julio-Aŭgusto 2001

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio

☎: (08) 9641 1937

📠: (08) 9641 1134

E-poŝto: [sudakruco@sudakruco.org](mailto:sudakruco@sudakruco.org)

## Libroservo

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo, 143 Lawson St Redfern, NSW 2016, Aŭstralio. E-poŝte:

[libroservo@ans.com.au](mailto:libroservo@ans.com.au)

## Korespondaj kursoj

Hazel Green, 44 Towomba Road, Oakey Qld 4401, Aŭstralio. E-poŝte:

[hazgreen@tmba.design.net.au](mailto:hazgreen@tmba.design.net.au)

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO,  
VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: “Ni vere bezonas artikolon pri ...?” Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, desegnaĵon, foton. Ni preferas ke vi sendu vian kontribuon per e-poŝto, al la adreso [sudakruco@sudakruco.org](mailto:sudakruco@sudakruco.org); vi povas ankaŭ sendi ĝin sur Zip-disko (100mb aŭ 250mb), sur komputila disko (Mac aŭ Windows), sur KD, aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

**La kovrilbildo:** Mapo de la mondo kiel ĝi estis konata antaŭ la komenco de la jaro 1492.

## EN ĈI TIU NUMERO

### Artikoloj:

La sekreto de Ŝam (Aniruddha Banhatti) . . . . .	3
Ĉu ekzistas Esperanta folkloro? (Riitta Hämäläinen) . . . . .	8
Ronald Briggs kaj mi (Betty Batt) . . . . .	12
Interrete . . . . .	13
Konferenco de Tutmondaj Verduloj	
vidpunkto de Jennifer Bishop . . . . .	15
vidpunkto de Sandor Horvath . . . . .	16
vidpunkto de Brian Currie . . . . .	17
De la Sekretario de AEA . . . . .	18
Zamenhof kaj la lingvaĵo en <i>Marta</i> (Donald Broadribb) . . . . .	22
El la regionoj . . . . .	23
NZEA-kongreso 2002 (Donald Rogers) . . . . .	24
Nevintra kanto (raporto) . . . . .	24
Odlo Bokserp raportas . . . . .	25
Ekskurso-aventuro en Nepalo 2002 . . . . .	26

### Recenzoj:

<i>Ni tostu la verdan fortunon</i> (KD-o de Georgo Handzlik, rec.D.B.) . . . . .	19
<i>Danteskaj itineroj</i> (de Vittorio Russo, rec. D.B.) . . . . .	19
<i>Marta</i> (de Eliza Orzeszko, tr. Zamenhof, rec. D.B.) . . . . .	20
<i>La lada tambureto</i> (de Günter Grass, rec. D.B.) . . . . .	20

### English Supplement

ESK estas legebla per la Interreto,  
ĉe: <http://www.esperanto.org.au/esk/>  
aŭ: <http://www.sudakruco.org/>

Limdato por artikoloj por la septembra numero: 13 aŭgusto.

## LA SEKRETO DE ŜAM

### De Aniruddha Banhatti

Kiel kutime, je la naŭa horo, la plej grava afero estis okazanta en la domo de Ŝam. Lia patro estis foriranta al la oficejo. La patro de Ŝam staris centre en la koridoro, portante pantalonon kaj ĉemizon. Ĉar li portis tiujn vestojn, li ŝajnis plia alta kaj dika. En la okuloj de timigita Ŝam, li ŝajnis tiel grandega ke li plenigis la tutan koridoron. Eble tial la patrino de Ŝam staris tre apude al muro. Kaj inter sia patrino kaj la muro, Ŝam staris, kun siaj manoj premitaj en la akseloj kaj siaj lipoj preme fermitaj. Li gardis sian spiron ene, kaj rigardante al Paĉjo kun klina kapo kaj moviĝantaj okuloj, egan timon li sentis!

Ŝam sin sentis iom for de Paĉjo. Por tio, la kialoj estis multaj kaj strangaj. Paĉjo havis lipharojn. Li havis harojn en la oreloj. Kaj liaj fingroj estis dikaj. Eĉ se la patro forigis la okulvitrojn, Ŝam ne rajtis tuŝi ilin. Li legis la ĵurnalon ĝis Ŝam tediĝis. Kiam Ŝam estis sidanta sur la apogseĝo, li diris al Ŝam: “Malplenigu la seĝon!” kaj li mem sidiĝis sur ĝin. Kiam li fingre tordetis vangon de Ŝam ludeme, Ŝam ne rajtis plori eĉ se tio estis foje iom dolora. Tiutempe, li devis pretekste ridi. Li brakumis la Patrino de Ŝam kaj diris: “Ŝam, Panjo estas mia! Ne estas via!”, kaj kiam Ŝam aŭdinte tion estis plorema, li laute ridis. Li elprenis iun aĵon el la mano de Ŝam, kaj tenis ĝin alte, kaj diris: “Prenu”, kaj Ŝam saltis kaj saltis, sed neniam atingis tiel alten. Se Ŝam ploris, li kriis, kaj se Ŝam estis tima, li ridis. Li ne timiĝis pro blatoj, kaj facile li levis akvoplenan sitelon. Pro ĉi tiaj kialoj, li ŝajnis iom for, al Ŝam.

Li ne estis sentata intima kiel Panjo.

Kaj kiam li surhavis la eksterirajn vestojn, li ŝajnis iom pli neintima. Ŝajnis ke li apartenas al oficejo, ne al la hejmo.

Paĉjo ridis. Liaj brilaj ŝuoj faris “karr-karr”-sonon. Panjo vigiliĝis por vidi kion li deziras, kaj Ŝam sentis ĝin. Tiam nesciante li malantaŭenigis sian kapon. Lia korpo ricevis ŝokon de timo kaj lia kapo frapiĝis kontraŭ la muro. Pro la doloro, Ŝam pli kuntiris sian korpon. Li pensis ke kiam lia kapo frapiĝis kontraŭ la muro, tio faris bruegon. “Paĉjo aŭdis ĝin kaj nun li kriis al mi!” Pro ĉi tiu timo Ŝam maltrankviliĝis. Li kuntiris la sarion de Panjo en sia mano.

Tiam mola, amema mano malantaŭen venis, Ŝam delonge konis la manon. Tiu mano metis tason da lakto al liaj lipoj, kaj forviŝis la gutojn de lakto kiuj likis tra la angulo de lia buŝo. Tiu mano banis lin, kaj kiam la sapo eniris la okulojn, la sama mano per varma tuko kvietigis liajn okulojn. Tiu mano vestis lin, kaj gratis lin je ĝuste tiu loko kiun lia mano ne povis atingi. Tiu mano ordigis lian hararon kaj metis ŝuojn sur liajn piedojn kaj igis lin senti ke iu ligis lin. Li toleris tion pro ŝnureto de amo kies ekziston mem li ne konsciis. Tiu mano tiklis lin sen piki per najloj kaj sen dolorigi, ame tordetis lian vangon. Tiu mano milde frapetadis lin ĝis la dormo, kaj metis oleon en lian oreton, kiu profunde eniris kaj glate tiklis lin. Kaj kolere, senĉese frapadis lin kelkfoje, tiu ankaŭ estis la sama mano. Tiu mano malantaŭen ŝtele venis, kaj precize je la loko kie

estis la doloro, frotis la kapon. Ŝam kuraĝiĝis. Li kaptis tiun manon. Tiu mano ame tordetis lian vangon.

Tiu komunikado inter li kaj Panjo, kiu daŭris sen scio fare de Paĉjo, donis al li anserhaŭton. Li kompatas Paĉjon kiu diris ke Panjo estas lia. Vere Panjo apartenis nur al Ŝam. Kiel ĉi tiu, multaj aliaj sekretoj ekzistis inter ŝi kaj Ŝam, sed ne ekzistis inter ŝi kaj Paĉjo.

Ŝam tre amuziĝis kaj unu penso eniris en lian kapon. Li milde kaptis la Panjan manon kaj per siaj pikaj dentoj, mordis ĝin. Tiam Panjo subite forigis la manon kaj poste frapetis lian vangon. La humurkompreno de Ŝam estis iom stranga. Multfoje Paĉjo ŝercis, sed Ŝam neniam komprenis ke estas ŝerco, kaj li pensis ke Panjo ridas por ke Paĉjo ne koleriĝu. Kiam Paĉjo ŝerce grimacis antaŭ li, li neniam ridis, kontraŭe, li timis. Por plaĉi Paĉjon, li penis ridi, sed kiam la rido ŝanĝiĝis en ploron, li mem ne scias, kaj Paĉjo kriis: “Kiel stulta knabo!” Kontraŭe, kiam li vokis “makad” (simio) al la “papad” (manĝaĵo) kiun Panjo faris, li laŭte ridadis dum longa tempo. Post ĉiuj du minutoj, li diris “makad” kaj ridadis. Lia stomako doloris, akvo elvenis el la okuloj, sed li daŭris ridi. Li ridis tiom ke li falis kaj lia kapo frapiĝis kontraŭ la plankon, tiam li komencis plori. Tiam li ĉesis ridi.

Ankaŭ nun, li komencis ridi. Por gardi la ridon ene, li metis ambaŭ manojn sur la buŝon, sed iom da rido elvenis.

Samtempe, Paĉjo grimacadis kaj penis butononumi la ĉemizon je la kolo. Li subite kriis: “Ĉu li estas tajloro au barbiero? Kiel li kudris la ĉemizon!” Ŝam pensis ke Paĉjo koleras al Panjo ĉar Ŝam ridis.

Por ke Panjo ne koleriĝu al li, li premis ŝian manon. Sed samtempe ŝi liberigis sian manon, kaj por butonumi la ĉemizon, ŝi iris apud Patron. Lia ŝirmilo forlasis lin. Li estis malkaŝa. Kun timo, li sin gluis al la muro kiel lacerto. Li sentis unuafoje kiom apuda li estis al Paĉjo, kaj ek-moviĝis malantaŭen.

Li fiksrigardis kiam Panjo butonumis. Li timis ke Panjo ne povos butonumi kaj Paĉjo krios. Li volis helpi Panjon. Unufoje, Paĉjo transiris la straton kun li sed Panjo restis tiufanke. Ankaŭ tiam li ĝeniĝis pri Panjo kaj li kuris al ŝi sen zorgo pri la Paĉja kriado aŭ la kuregantaj aŭtoj.

Ankaŭ nun senkonscie li antaŭen iris. Kiel Panjo staris sur siaj piedfingroj, tiel ankaŭ li staris. Kaj por butonumi kiel la Panjaj fingroj moviĝis, tiel ankaŭ liaj fingroj moviĝis.

Tiam Paĉjo kriis: “Ho! Vi pinĉas min!” Panjo timis. Ŝam vidis ke li estas tre for de la muro. Li volis malantaŭen iri. Li ankaŭ volis helpi Panjon. Li konfuziĝis. Lia vizaĝo blankiĝis. Li nur staris kun levitaj manoj. Tiam Paĉjo moviĝis je du paŝoj. Ankaŭ Patrino moviĝis. Kaj ŝi koliziis kun Ŝam.

Paĉjo kriis: “Kial vi ankaŭ intervenas ĉi tie?” Ŝam subite malantaŭen iris kaj kiel larcerto li premiĝis kontraŭ la muron. Liaj lipoj tremis. Okuloj akvumiĝis. Tensio tiom longe ekzistinta nun iĝis netolerebla. Nun ploro estis nepra.

Sed Ŝam uzis sian cerbon. Kial, oni ne scias, sed Ŝam enmense vidis bildon de laboristo kun levita martelago, kaj li ne ploris. Tiam estis tre grave al li ne plori. Ĉar ĉiutage kiam Paĉjo lasis la hejmon, pro iu ajn kialo, Ŝam ploris, kaj Paĉjo ankaŭ plie koleriĝis. Tial Panjo estis dirinta al li:

“Paĉjo estas tre bona. Li laboras ege en oficejo kaj alportas monon hejmen. Tial ni devas konduti bone al li. Kiam li ŝercas kaj ridas, ni ridu! Kiam li koleriĝas, ni restu silentaj. Ni faru ĉiujn liajn komisiojn.” Kiam Panjo rigardis en liajn okulojn kaj diris tion, tiam Ŝam sin sentis grava, sin sentis adolto.

Ŝi parolis al li kiel oni parolas al adoltoj. Ŝi diris al li ke li kondutu kiel adolto. Estis multaj sekretoj inter Panjo kaj Ŝam. Manĝante, se li levis fingron kaj faris cirklon en la aero, Panjo donis al li pli da butero. Tiu sekreto estis plej ŝatata de Ŝam. Sed ĉi tiu sekreto pri la konduado kun Paĉjo estis grava. Ĝi kunligis ilin per alia ŝnureto. Kaj tial al Ŝam ĝi estis grava kiel nova ludaĵo. Por gardi la sekreton, li ĉesis plori.

Kiam la butonumo estis farita, Paĉjo inversigis la kolumon kaj etendis la manon. Sed Panjo ne komprenis kion li volas. Ŝi rigardis al li konfuzite. Sed Ŝam komprenis kion li volis. Tial li antaŭen iris kaj kaptante ŝian manon, diris: “Ĝin li volas! Ĝin!”.

Panjo iom ĝeneme diris, “Kion vi volas nun Ŝam? Mi donos al vi poste.” Ŝam timis. Li penis konduti kiel saĝa knabo kaj Panjo pensis ke li kondutis kiel stulta knabo. Certe ŝi pensas ke Ŝam ne komprenis la sekreton. Li ne meritas ĝin. Kaj la kialo? La kialo estis ke ŝi ne audis lin! Ŝam koleriĝis pro la maljusteco. Por forigi ŝian malkomprenon, li volis paroli, sed li timis.

Fine, Ŝam nur fingre indikis la ŝrankon. Kaj kia surprizo! Patrino komprenis lian signon. Ŝi ridetis private al li. Rapide ŝi kunportis kravatton el la ŝranko. Antaŭ ol li levis la kapon, ŝi metis ĝin en la manon de Paĉjo, kiu legas la paperojn en sia

alia mano. Ŝam feliĉe ridis. Nun li iom kuraĝiĝis. Tiam la kravato glitis kaj falis. La koro de Ŝam momente haltis. Li ĉirkaŭen rigardis, sed Panjo eniris por kunporti ion. En tiu tre grava okazo, la tuta respondeco falis sur lin. Li konfuziĝis. Ankaŭ li koleriĝis je Panjo kiu eniris precize dum tiu okazo. Li pensis ke ankaŭ li kuros enen, kaj Paĉjo krii sola! Tiam li memoris la sekreton. Li sentis la respondecon kaj ? — kaj li estis tentita tuŝi la kravatton.

Ŝam tre ŝatis ĉiujn aĵojn de Paĉjo. Liajn okulvitrojn, lian arĝentan cigarujon, liajn orajn butonojn. Pose di ĉi tiujn aĵojn, tuŝi ilin kiam ajn, tio estis la amplekso de feliĉeco, la amplekso de adolteco laŭ Ŝam. Sed li ne volis posedi ilin. Li estis saĝa. Li volis tuŝi ilin kelkfoje. Sed eĉ lia limigita deziro ne plenumiĝis, kaj nun —.

Ne sciante kion li faras, Ŝam kliniĝis kaj levis la kravatton. La tuŝo estis precize kiel li pensis. Li rondokule vidis la glatan tekson, kaj kulpeme li etendis la kravatton antaŭ Paĉjon. Sed Paĉjo ne vidis, Ŝam deziris meti ĝin en la manon de Paĉjo. Sed al li mankis la kuraĝo. Li restis kiel li estis, glutis, kaj kun plena kuraĝo diris: “Paĉjo!”.

Paĉjo levis la kapon kaj prenis la kravatton el lia mano. Ŝam pensis ke li eĉ ridetis al li. Sed tuj kiam Ŝam pensis tiel, lia vizaĝo serioziĝis.

Tiam Panjo revenis, Ŝam volis danci ĉirkaŭ Panjo kaj krii: “Mi donis la kravatton al Paĉjo! Mi do----nis, mi do----nis.” Sed ne estas la ĝusta tempo por tio.

Kiam Paĉjo foriros — li ne povis decidi ĉu li devus danci kaj krii aŭ ĉu li devus diri la vortojn simple — rigardante ien for —.

Kaj samtempe la nodo de la krava-

to misfariĝis. La vizaĝo de Paĉjo ruĝiĝis. Sur lia vango la tipa linio de ŝvito ekfluis. Pensante ke denove la nodo malordigōs, lia vizaĝo iĝis obstina kaj kruela.

Vidante tion, Panjo surloke moviĝis ĝenite.

Ankau Ŝam maltrankviliĝis.

Sed nun lin tedis timi Paĉjon. Dum longa tempo li respondece kondukis, sed malgraŭ tio Paĉjo koleriĝis kaj lia foriro al oficejo daŭris. “Kial mi timu Paĉjon? Kiu estas li?”, li sindemandis. Kiam Paĉjo kverelis kun iu, tiu persono estis same demandinta. (Kaj tial Ŝam sciis ke ni devas demandi tiel.) Ŝam deziris demandi tiel al Paĉjo, kaj kvereli kun li. Li deziris adoltiĝi kaj batadi kaj faliĝi Paĉjon, kontraŭ lia deziro; en lia imago, tiu batado komencis okazi.

Ŝam timis pri la pensoj en sia menso. Ili estis tute kontraŭaj al tio kion Panjo diris al li pri bona kondutado. Li pensis ke Panjo scios la pensojn kaj ne parolos kun li, ne brakumos lin kaj ne donos buteron al li. Tial Ŝam timegadis. Sed la kruelaj pensoj ne ĉesis.

Tiam la nodo fariĝis. La kruela vizaĝo mildiĝis. Panjo ekridis. Ankaŭ Paĉjo ridis — iom knabece.

Sed Ŝam ne ridis. La graveco de Paĉjo, kiun Panjo sentis kaj penis ke ankaŭ Ŝam ĝin sentu, tion Ŝam neniam povis senti. Li senemocie rigardis al la dika paĉja vizaĝo kaj la linio de ŝvito.

Li nun deziris adoltiĝi rapidege.

Nun la plej grava evento ekokazis. Paĉjo elprenis sian monujon kiu havis multajn poŝojn kaj estis dika per gravaj paperoj. Ĝi estis aroganta kiel Paĉjo.

Paĉjo malfermis la monujon kaj miksis la enajn monbiletojn kaj pa-

perojn. Li elprenis du monbiletojn kaj ordonis al Panjo: “Kalkulu.”

Obeeme Panjo komencis. Ankaŭ Paĉjo kalkulis la alian bilet-pufon. Laŭ la hejma rutino, Ŝam estis certa ke la monujo de Paĉjo estas la plej grava aĵo en la domo. Ĉiuj aferoj dependis je ĝi. La pia mieno kiu ne estis sur ilia vizaĝo dum ili preĝas al Dio, tuj aperis tie parolante pri la monujo aŭ ĝin tuŝante. Ŝam jam vidis la monujojn de la Paĉjoj de liaj amikoj. Sed ili ne estis tiel glataj aŭ tiel dikaj kiel la monujo de lia Paĉjo. Kaj ankaŭ ne estis tiom da monbiletoj en ili. Tial Ŝam sciis ke la potenco de ĉiuj Paĉjoj en la mondo dependas de iliaj monujoj. Kaj ĉar lia monujo estis dika, la potenco de Paĉjo estis granda.

Kaj Ŝam koleriĝis pro ĉi tiu potenco. Li sidis neŭtrale rigardante ilin. Panjo parolis ion ameme al Paĉjo, ludante kun lia kolumo kaj movante sian kruron konstante. Paĉjo metis kelkajn biletojn plu sur lito, kaj vikle, ŝi amasigis ilin.

Ŝam, eble la unuan fojon, koleriĝis serioze kontraŭ Panjo. Li pensis: “Panjo ne estas mia. Ŝi apartenas al Paĉjo. Ŝi trompas min, sed mi ne trompiĝos.” Li ne volis Panjon kiu apartenas al Paĉjo. Li volis neniun.

Kiam Ŝam pensis tiel, li sin sentis brava. Li deziris batali kontraŭ iu. Kaj li memoris la rakonton kiun Panjo lastanokte rakontis. Kaj Paĉjo ŝajnis al li kiel la giganto de la rakonto. Kiel la potenco de la giganto estis en lia longa dikfingro, tiel la potenco de Paĉjo estis en la monujo. Kaj estis inteligenta knabo en rakonto, kiu kaŝis sin en la loĝejo de la giganto, kaj kiam la giganto dormis, la knabo tranĉis la dikfingron mortigante la giganton. Kaj la knabo feliĉe vivis kun la bela princino kiun la giganto estis

kaptinta — Ankaŭ Ŝam, kiam ĉiuj dormis, leviĝis kaj elprenis la monujon el la poŝo de la ĉemizo ce Paĉjo. Tiam lia dika, forta Paĉjo tuj iĝis malgranda kaj maldika kiel la Paĉjo de Rameŝ. Ŝam forigis lin al oficejo. Kaj kiu estis la bela princino kiun Paĉjo kaptis hejmen? Ho! Ŝi estis Panjo! Kaj Ŝam feliĉe vivis kun Panjo.

Ŝam ŝokite malfermis siajn okulojn. Li ja dormetis dum kelkaj minutoj. Li bone sidis kaj rigardis al Paĉjo kaj Panjo — Panjo parolas ridante kaj Paĉjo komencis surmeti la mantelon. Ŝam subite rigardis lin atendente ion. Kaj okazis laŭ lia atendo. Kiam Paĉjo surmetis la mantelon kun ekskuo, el la ordiĝitaj haroj de lia kapo unu plumtufo staris kaj ĝi tremadis. Ĉiutage la plumtufo staris kaj Ŝam ĉiutage kutimis vidi ĝin. Kiel li tre amis Panjon pro ŝiaj kelkaj haroj sur la vango, tiel li tre malamis Paĉjon pro la plumtufo.

Kaj nun, vidante la plumtufon li volis plori, krieri, tondi ion. Li ne sciis kion li havigos agante tiel. Sed li sentis ke estas io pezega sur lia brusto kaj li devas ĝin forĵeti. Tiam Panjo ridante diris, “Ŝam, venu ĉi tien.”

Ŝam, nedezirante, iris al ŝi kun balonitaj vangoj. Li volis stamfi per la kruroj. Sed li ne faris tion pro timo je Paĉjo. Kaj tial li plie koleriĝis kontraŭ Paĉjo. Kiam li apudvenis, tiam Panjo okule signalis lin private kaj petole. Ŝi ridis kaŝe, kaj diris: “Etendu la manon. Vi volas la belan, bonan, triciklon, ĉu ne? Por aĉeti tion, Paĉjo donos monon al vi.”

Io tuŝis la koron de Ŝam kaj prenis. Piketoj de feliĉeco disvastiĝis sur lia korpo. La nova, brila triciklo dancis antaŭ liaj okuloj. Li rajdis ĝin kaj rapide iris for — for — panjo ridante

kuris malautaŭ li. Li rajdis ondon de feliĉeco kaj iris for-for —.

En tiu inundo de feliĉeco, lia malamo je Paĉjo fluis ien ajn, kaj etendante la manon kaj premante la monbiletojn en ĝi, li pensis ke nun li komprenas ĉion. Li petole kaj ŝtelece ridetis al Panjo. Trompi Paĉjon parolante bone, kaj farante liajn komisi-ojn, kaj tiel ekstrakti novajan triciklon el li — li subite komprenis la planon de Panjo. Ankaŭ tiu estis sekreto inter li kaj Panjo. Estis malvera tiu parolo ke Paĉjo estas bona kotopo. Kiel diri “la muŝo kuris” kun aplaŭdo de mano! La vero estis ĉi tio. Ĉi ĉio estis nova, estis malsame al ĉio kiun ĝis nun Ŝam aŭdis. Estis malbone. Sed ĝi estis vera. Li povis kredi ĝin. Aŭdante tion, li ne sentis sin sufokigata. Panjo skuis lian ŝultron kaj diris: “Ŝam, Paĉjo eliras. Diru ‘Ĝis revido’ al li.”

Ŝam yidis ke Paĉjo vere estis ĉe la pordo. Ŝam iris al la pordo. Kutime li diris “Ĝis revido” konfuzite sen deziro, sed hodiaŭ, per klara, libera voĉo, li kriis: “Ĝis revido! Ĝis revido!” Aŭdante tion Paĉjo feliĉiĝis kaj ame tordetis lian vangon. Panjo ame tordetis la alian vangon. Paĉjo eksteren iris. Li surmetis la ĉapelon. La plumtufo malaperis sub ĝi. Paĉjo ne restis Paĉjo sed iĝis nur promenanta persono sur strato; kaj ferminte la pordon Ŝam kaj Panjo rigardis unu la alian, kaj ridis amuzate! Ridis sekrete.



## POR RIDIGI VIN



Akuzanto: “Ĉu vi mortigis la viktimon?”

Akuzato: “Certe ne!”

Akuzanto: “Ĉu vi scias kiel ni punas tiujn kiuj mensogas?”

Akuzato: “Jesmultmalpliseveraj kiuj mortigas!”

[El *Tamen Plu*]

## Ĉu Ekzistas Esperanta Folkloro

### Riitta Hämäläinen

Antaŭ jaro oni intervjuis min pri Esperanto por la Helsinka radiostacio Radio City. La intervjuisto, Jarkko Luoma, demandis min surprize: Ĉu ekzistas Esperanta folkloro? Mi antaŭe neniam pensis pri ĉi temo kaj iom balbute rakontis pri kelkaj bagateloj. Sed por mi, iama studento pri folkloristiko, ĉi demando insiste restis en la kapo.

Esperanta folkloro estas kampo ne pristudita. Dum abundas studoj lingvaj kaj historiaj, preskaŭ mankas studoj pri la parolkomunumo, studoj sociologiaj kaj speciale studoj folkloraj. Parolkomunumo tiom vasta geografie kaj tiom malkohera pluraspekte certe ne estas la plej facila studkampo. Ĉu elirpunkte pli trakti Esperantujon kiel hobian rondon aŭ kiel etnon...certe ne etno, sed pli da etnaj trajtoj ol en golfklubo?

Bedaŭrinde mi ne trovas sufiĉajn tempajn eblojn "lonrotumi" (vagi kiel Lönnrot<sup>1</sup>) tra Esperantujo, kolekti aŭtentikan materialon sisteme, enketadi kaj intervjuadi. Tiel ĉi suba ne prezentos al vi profundan folkloran studon, sed nurajn pensojn, impresojn kaj observojn kaj kelkajn gvidliniojn al la temo. Se ili vekos diskuton kaj mi ricevos respondojn al kelkaj demandoj, bonege.

#### Kio estas folkloro?

La vorton folkloro oni facile, sed false ligas al pratempeco, kamparaneco, maledukiteco kaj al kiĉaj kliŝoj pri popoldancantoj, naciaj kostumoj kaj deklamantoj de kalevalaaj poemoj. Tamen folkloro kaj folklorajoj same

apartenas al la moderna mondo kaj ni ĉiuj estas – eĉ se senkonscie – uzantoj de folklorajoj.

La vorto folkloro devenas de vortoj "folk" (popolo) kaj "lore" (heredita tradicio). Ĝi signifas popolan kulturon. Folklorajo povas esti same bone popolfabelo aŭ pratempa plorkanto kiel infana ludpoemeto, imago pri najbaraj popoloj, urba legendo pri kato en mikrofono aŭ ŝerco pri niaj politikistoj.

Homgrupo estas folkloro unuo. Kiam ni parolas pri popola kulturo, ni memoru ke "popolo" ne nepre signifas tutan nacion, sed povas esti kiu ajn grupo da homoj kun ia komuna bazo. Povas temi pri popolo de tuta Eŭropo, popolo de unu sola lando, de certa aĝgrupo en la lando, pri lernantoj de certa lernejo, pri enloĝantoj de iu urbo aŭ vilaĝo, pri homoj de certa laborejo, sportklubo aŭ ajna alia hobia rondo. Popolo povas signifi eĉ tre malgrandan rondon, konsistantan el nur kelkaj personoj. Ekz. unu sola rokbanda aŭ hospitala ĉambropleno da pacientoj povas formi propran folkloran unuon. Ĉiuj tiuj grupoj havas sian folkloron.

Ni ĉiuj apartenas al pluraj grupoj. Ni estas Eŭropanoj, Finnoj, familianoj, reprezentantoj de niaj aĝoj. Folklorajoj kiuj estus absolute samaj por ĉiu Finno, egale ĉu infano aŭ pensiulo, ĉu vilaĝano aŭ Helsinkano ne nepre ekzistas.

Ankaŭ Esperantistoj evidente formas homgrupon, kiu havas plurajn subgrupojn. La elira supozo sekve estas, ke ankaŭ Esperantistoj devus havi sian propran folkloron. Tamen paralele al la ĉi supra mencio, Espe-

<sup>1</sup> La kolektinto/reverkinto de tekstoj por la verko *Kalevala*. — red.



rantaj folklorajoj ne nepre estas la samaj por ĉiuj Esperantistoj en la mondo, same por Eŭropanoj kiel por ekstereŭropanoj, same por junularo kiel por oldularo.

### **Buŝa kulturo senaŭtora**

Folkloro signifas buŝan kulturon, male al la literatura tradicio. Pratempe oni rakontis dum mallumaj vesperoj fabelojn kaj longajn epikajn poemojn por distri sin. Tiuj poemoj apartenis al buŝe heredita tradicio, ili ne aperis libroforme. La rakontistoj ofte eĉ ne scipovis legi. Same nuptotradicioj aŭ kredo je feoj kaj koboldoj ne aperis libroforme, sed en la buŝa, praktika tradicio. Ili herediĝis de generacio al alia aŭ de grupo al alia. Tiel ankaŭ la nunaj folklorajoj: De kontinento al alia, de lernejo al alia, de pli aĝaj infanoj al pli junaj.

Karakterizaĵo de folkloro estas ankaŭ ĝia anonimeco. Folklorajoj ne havas aŭtoron. Oni ne povas ligi iun rakonton, ŝercon aŭ anekdoton al difinita persono. Folklorajoj naskiĝas kaj cirkulas en la grupo kaj havas nebulan originon.

Nuntempe la limoj inter buŝa kaj literatura tradicio jam ne plu estas tute klaraj. Ŝercoj pri blondulinoj, basistoj aŭ pri Bill Clinton, unue vivaj nur en la buŝa tradicio, baldaŭ eksplode disvastiĝas rete aŭ aperas baldaŭ kajerforme.

### **Kampoj de folkloro**

Sekve mi uzos diversajn kampojn de Finna folkloro kiel skeleton por pli facile trovi Esperantajn folklorajn fenomenojn, eĉ se estas parte absurde provi trovi paralelojn inter fenomenoj de Finna folkloro kaj tiu de hobia grupo – nu, ni vidu.

### **Popolpoezio**

Popolpoezion oni povas dividi en tri grupojn: Al epika (rakonta) poezio, al

lirika (presenta) poezio kaj al rita poezio. Epika popolpoezio pri herooj, samkiel lirikaj plorkantoj en la moderna mondo estas jam mortaj tradicioj. Sed almenaŭ en nia Finna popola tradicio rita poezio plu havas rolon. Temas pri tiuj etaj rimoj, kiujn oni ofte eĉ ne konceptas kiel poezion: Dirajoj kiujn oni uzas en konkreta ĉiutaga situacio (“Etana, etana näytä sarves onko huomenna pouta”, “Anna, Antti, ahvenia”) aŭ la tuta ludpoezio kaj mokpoezio de infanoj (“Vasta pesty puhdas selkä, kuka siihen viimeks pisti, likaisella sormellaan...”, “Ota kiinni, mandariini, kandariini kanda”).

Ĉu rita poezio ekzistas en Esperanto? Se iam naskiĝintus tradicio, ke enirante la kongresejon LKK-anoj silente suspirus “Je animoj de Zamenhof, Grabowski kaj Kabe, iru la kongreso glate”, temus pri rita poezio. Sed tiel oni ja ne agas.

Naskiĝo de infana (Bone rimarku: De infanoj mem, ne kreita de plenkreskuloj) lud-kaj mokpoezio bezonas koheran grupon kaj oftan kontakton inter la grupanoj. Ĝi naskiĝas dum kortaj ludoj kaj konfliktoj aŭ en infanĝardenoj. Eĉ se ja ekzistas Esperantaj denaskuloj, kiuj sendube ludas kaj inter si konfliktas Esperante, ĉu kontaktoj inter tiuj infanoj estas tiom oftaj, ke ili havas la eblon krei inter si rimojn por ludoj kaj moko?

### **Rakonta tradicio**

Rakonta tradicio kutime floras ĉiufolklore. Al rakonta tradicio apartenas rakontado de fabeloj – modernmonde jam morta tradicio (Ne miksu kun legado aŭ rakontado de fabeloj de Grimm!), ŝercoj, klaĉoj, rakontoj kaj legendoj.

Nu, klaĉoj ĉiumedie ekĝermas kaj disvastiĝas, ankaŭ Esperante. Aŭ ĉu

vi ne jam aŭdis, kio *vere* okazis en la salono Fritzon meznokte dum KEF....?

Same certe ŝercoj. La plej fekundaj kampoj por naskiĝo de ŝercoj estas kutime najbaroj, politikistoj aŭ aliaj gravaj homoj kaj instancoj. Nur pensu, kiom da ŝercoj vi jam aŭdis pri Ahti Karjalainen, Martti Ahtisaari, Bill Clinton aŭ pri Svedoj kaj Rusoj.

En Esperantujo ni povus trakti UEAn, COŉn aŭ EAFon kiel “politikistojn”. Ankaŭ Zamenhof mem devus esti bona grundo por ŝercoj. Najbaran valoron povus porti Volapuko kaj Ido.

Sed mi malbone konas ŝercojn por rakonti al vi konkretan ekzemplon. Tamen io pure Esperanta devas ekzisti. Ĉu vi ne aŭdis ion pri Jukka Laaksonen, Päivi Saarinen kaj Seija Kettunen, kiuj renkontiĝas en kafejo por trakti la protokolajn punktojn? Aŭ pri Idisto, Volapukisto kaj Esperantisto kiuj bierumas dum kongreso? Kion diris Zamenhof al Grabowski survoje al klubvespero?

Legendoj estas rakontoj pri sanktuloj kaj sanktaj temoj, rakontoj siaflanke estas traktataj kiel vero. Rakontoj kompreneble en Esperantujo ekzistas. (Vidu pli sub “Memora tradicio”)

Ĉu legendoj ankaŭ? La funkcio de legendoj estas firmigi kredon de iu grupo pri certa fenomeno. Pratempe oni legendumis kaj rakontadis pri renkontoj kun feoj, koboldoj, diabloj kaj tiel firmigis la kredon pri ekzisto de tiuj estaĵoj. Kio pri la rakonto pri naskiĝo de Esperanto? “Jam infanaĝe Zamenhof ekkomprenis la gravecon de komuna, internacia lingvo kaj ties signifon por la monda paco...”. Ĉu vere tiel aŭ ĉu jen legendo? Kio se Zamenhof fakte estis simple ambicia homo, ĵaluzeta, kun neniomaj noblaj ce-

loj, volis nur krei lingvon pli bonan ol aliaj tiutempaj planlingvoj kaj hazarde sukcesis pli bone ol la aliaj?! Ĉu ne ĉi tia mallegendo detruus la entuziasmon kaj mondkoncepton de pluraj Esperantistoj?

Kaj kiel fakte okazis la naskiĝo de verbo “krokodili”? Ĉu vere aperis stulta krokodilo en Sveda lernolibro aŭ ĉu jen temas pri plia legendo?

### Miniloro

Miniloro signifas folklorajn tre kurtforman. Ofte temas pri unu sola frazo. Temas pri popolaj diraĵoj (“Perkele, sanoj pieni poika kun isä kuoli ja äiti haudattiin”), proverboj (“Ruoho on vihreämpää aidan takana”), enigmoj (“Mikä on punainen ja kulkee ylös alas? – Tomaatti hissisä.”), trompfrazoj (“Sano valas. – No, valas. – Vedä kymmenen kertaa housut alas”), perifrazoj (“heittää veivinsä”) kaj komparoj (“päissään kuin käki”).

Zamenhofajn proverbojn ni Esperantistoj certe konas, sed ĉu ankaŭ folkloraj miniloraĵoj ekzistas? Miniloraĵoj estas ĉiulingve kampo kutime tre prospera. Eĉ infanoj facile uzas kaj kreas diversajn komparojn, perifrazojn kaj enigmojn. Mia 3-jarolino antaŭ ne longe komentis kamentafajron “Sehän syttyi kuin iloinen mieli.” aŭ informis min pri sia silentemo: “Mä oon tänään hiljainen kuin maipotölkki.”

Perifrazumi kaj enigmumi tamen postulas de la parolanto kaj aŭskultanto tre firman lingvan bazon. Ne nur korekton, sed kreivon kaj spontanon en parolaj kuntekstoj.

Nu, kiom da perifrazoj vi mem konas Esperante? Morta kiel...? Ebria kiel...? Aŭ kiom da Esperantistoj vi persone konas, kiuj eĉ teorie kapablas spontane-babile krei esprimivajn

komparojn kaj proverbojn? Mi ne konas multajn.

Kelkajn mi aŭdis. Vera perlo jen – ĝi perfekte sekvas formulecon de komparoj kaj aldone havas alludon al pure Esperanta medio. Sekve ĝi estas komprenebla nur al homo, kiu bone konas nian movadon: Iu afero estas “pli malverŝajna ol langa kiso inter Silber kaj Camacho”. Alia ofte aŭdita komparo jen: Io povas esti “pli teda ol komitatana kunsido”.

Aparta kampo de miniloraĵoj estas t.n. libroloro. Tiam la frazo havas beletran originon, sed komencas sendependan vivon eksterbeletran. Ĝi iĝas tiom vaste konata, ke oni eĉ ofte forgesas la beletran originon. Oni parolas ankaŭ pri “flugilaj vortoj”. Tre fama ekzemplo estas la frazo “ollako vai eikö olla”, sed kiu memoras de kiu verko ĝi devenas?

Foje flugilojn havas tuta frazo, foje oni prenas parton de la frazo kaj aldonas al ĝi fremdan elementon. Eble unu el la plej famaj Esperantaj libroloraĵoj estas pruntaĵo el la Zamenhofa poemo (*La vojo*): “Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante...ni iru al kafejo”.

Ankaŭ librotitolo povas iĝi folklor-aĵo. Jam mi aŭdis la esprimon “mi estas plena kaj ilustrita” por esprimi ekz. postmanĝan kontenton.

Denove iom bridas naskiĝon de Esperantaj libroloraĵoj la magraj scioj de Esperantistoj mem pri nialingva literaturo. Libroloraĵoj kiel “percepti haŭte bieremon tuja” apenaŭ naskiĝas, ĉar kiu jam konus la koncernan originalon de Miguel Fernández! (Origine: “Percepti haŭte turt-flugon tuja” / Fernández / Ibere libere/Tuja, p.103).

Iom pli ni ŝajnas koni la roklirikon, tiel almenaŭ la junularo. Freŝan muzikloran ekzemplon ni trovas tuj en Finnlando. “Ĉu vi pretas...” + fremda elemento jam fulmrapide iĝis flugila frazo dum ĉi somero. Repkantstila [“rap music” style] demando “Ĉu vi pretas por la veno de vespermanĝo” estas tre aktuala ekzemplo pri Esperanta folkloro. La originon por tiu frazo oni trovas en la kantoteksto de fama Finna Esperantobando, Dolĉamar, kiu siarepe [in its rap style] demandas “Ĉu vi pretas por la veno de Dolĉamar”. (*Dolĉamar / Lingvo Intermonda / Ĉu vi pretas*) La frazo tamen tuj ekflugis eksterkanten kaj rapide kaj folklore disvastiĝis inter la Esperanta junularo kaj muzikemularo.

Esperantaj miniloraĵoj estas ankaŭ kelkvortaj konceptoj kiel “La bona etoso” (Origino el la komiksalbumo *La D-ro Senesperanto serĉas la bonan etoson* de Arnau Torras), “La bona lingvo”, “Esperanto-edzperanto”, “konstanta kongresa edzino”, “la fina venko” (Foje ŝerce “la Finna venko”) aŭ “veni, vidi, vici”. Ankaŭ la fama frazo, ŝajne Raŭmo-origina, “Ne tuŝu la teknikajojn” estas Esperanta miniloraĵo.

### Popoldancoj kaj ludoj

Ludoj pratempe estis grava elemento ne nur en infana, sed en junulara kulturo. Sabatvespere la junularo kolektiĝis por svigilado aŭ por rondodancoj. Speciale dancoj estis grava kanalo al tuŝoj kaj erotike saturita etoso.

Klaregan paralelon oni povas vidi kun “La bambo”, dancata en junularaj Esperantaj rondoj. La danco mem ne estas Esperanta folkloro, ofte ni eĉ aŭdas ĝian hispanlingvan version. Sed la tradicio danci bambon kaj la “ludreguloj” estas klare Esperanta folklor-aĵo.

Temas pri rondodanco. En la mezo de la rondo dancas kelkaj unuopaj knabinoj kaj knaboj. Dumdance la knabinoj iras al iu enronda knabo kaj kisas lin survange (aŭ surbuŝe, laŭkuraĝe), la knaboj iras al knabinoj samcele. La bambon oni dancas eĉ kelkdekfoje sinsekve. Foje ĝi helpas naskiĝon de rilato, al kiu mankis kuraĝo en taga lumo, sen la sekura bambuma rondo. La dancregulojn oni kutime lernas nur buŝe kaj praktike, novulo aŭdas ilin de plispartulo.

Enirante festejon kun bambumantoj, oni je unua rigardo povas distingi inter tiuj, kiuj estas unuafajloj en la kongreso kaj kiuj jam ĝisostaj movadanoj – nur laŭ la bambumaj paŝoj kaj agoj. Mi plu memoras mian unuan kontakton kun ĉi furora junulara danckutimo. Okazis en itala IJF, junulara festivalo. Mi dancis en la rondo, tuj la unuan vesperon, en mia unua junulara renkontiĝo iam

ajn kaj sciis nenion pri la tuto. Subite venas al mi itala knabo, tute ne konata, kaj ekkisas min. Kia ŝoko! Ĉu ĉiuj italoj estas ĉi tiom abrupte spontanaj kaj frenezaj! Nur poste mi lernis agi laŭ la folkloraj atendoj.

La Bambo naskis ankaŭ mokvorton kaj koncepton: “Bambisto aŭ eĉ eterna bambisto” estas persono kiun nenia serioza programo interesas kaj kiu emas nur trabambumi la kongresajn noktojn.

### Popolmuziko

Popolmuziko klare en Esperantujo ne ekzistas, eĉ se kelkaj pecoj jam akiris preskaŭ popolmuzikecajn trajtojn kiel i.a. “IS” aŭ *Sola* de Amplifiki (Amplifiki/*Tute ne gravas*), klasikaĵoj en la junularaj rondoj pri la novjara festivalo en Germanio. Supozeble ne ĉiuj, kiuj kantas “Sola, sooooola, soooooooooola...” havas ian ajn ideon pri la origino de tiu kanto.

[Represita, kun permeso de la aŭtoro, ell  
*Esperantotelehti* aprilo 2001]

---

## Ronald Biggs kaj mi de D-ro Betty Batt (kun helpo de Ronald Gates)

Estis kun intensa antcipio, ke mi atendis la aperon sur mia televida ekrano de Ronald Biggs, la renoma vagonar-rabisto. Jen la viro mem, kiu ĉefe respondecis por mia loĝiĝo en la urbeto Uralla, en la nordo de Novsudkimrujo.

Naskite en Yorkshire, kaj trejniĝinte por esti kompetentaj kamparaj ĝeneralaj kuracistoj, Eric kaj mi geedziĝis en la jaro 1950 kaj tuj ekvojaĝadis, parte por plezuro kaj parte por decidi precize kie ni deziras starigi nian praktikadon.

En 1953 ni jam decidis ke nia unua prefero estas la Angla kamparo. Manke de tio, ni preferis lokiĝi ene de radiuso de tridek mejloj<sup>1</sup> de Armidale, universitata kaj kampara urbo en la norda Novsudkimruja altebenaĵo, kie jam loĝis fratino mia.

La Brita nacia sanservo tiam ekzistis de nur kelkaj jaroj, kaj la pli aĝaj ĝeneralaj kuracistoj, kiuj antaŭe aĉetis siajn praktikadojn kaj nun ne plu rajtis ilin vendi, daŭre alkroĉiĝis

<sup>1</sup> 50 kilometroj — red.

al ili ĝis maljuniĝo aŭ malbona sano devigis ekŝigon. Pro tio, tre malmulte da praktikadoj disponebliĝis, kaj por akiri unu el ili kuracisto devis sin proponi al loka komitato.

Ni baldaŭ konstatis ke sen speciala influo en la loka komitato ni havas neniu ŝancon ricevi la ununuran specon de praktikado kian ni deziris.

Ni do retiriĝis al familiposedata dometo en fora kamparo kaj ĉesis legi *British Medical Journal*-on, en kiu estis listataj vakaj praktikadoj.

Tamen kuracisto, por kiu Eric antaŭe laboris, informis min, ke se ni volas ricevi la praktikadon aperontan en la listo en tiu semajno, li povos apliki la necesan influon en ĝia komitato. Mi respondis ke pri tio mi sciigos lin, post kiam mi legos la detalojn.

La priskribo montriĝis perfekta: tereno en Cumberland etendiĝanta en Skotujon; kvarradtransmisia

veturilo; “mem plenumu la preskribojn”; precize nia tipo de vivaranĝo. Ni enpoŝtigis petilon al la komitato, kaj mi poste skribis leteron al nia patrono.

Post iom da tempo ni ricevis de la komitato sciigon pri rifuzo. Ni decidis ke se ne eblas akiri la deziratan praktikadon eĉ kun helpo de speciala influo, ni devas rezigni pri Anglujo kaj kontentiĝi per Aŭstralio.

Ĝuste kiam ni pakis por vojaĝi al Uralla, nia influhava amiko telefonis por peti ke ni faru portempan anstataŭadon. Mi respondis ke ni estas forlasontaj Anglujon.

“Ĉu vi ne deziris la praktikadon kiun mi povus havigi al vi?”

“Ĝi estis precize tia, kian ni volis.”

“Do kial vi ne informis min?”

Tiam mi ekkonsciis ke mia letero al li ne atingis sian ircelon. Ĝi troviĝis inter la poŝtaĵoj perditaj pro la vagonar-rabado. □

---

## INTERRETE

- **Macintosh: Uzantoj de OS X** povas uzi Unikodon por sia e-poŝto kaj ankaŭ per la senpaga retlegilo Omnibweb. (La legado okazas aŭtomate. Por mem tajpi Esperantan literon, elektu la EXTENDED ROMAN KEYBOARD kaj premu OPTION 6 plus la koncernan literon: c, g, h, j, s por fari ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ; kaj OPTION b plus u por ŭ. — Ankoraŭ neniu makropretiga programo ekzistas por OS X, do nuntempe ne eblas plisimpligi la tajpadon.

- **“Kurso de Esperanto”** estas komputila programo por lerni Esperanton. Ĝi estas frukto de multthoma laboro, kaj jen estas eldonita ĝia dua versio, kun multaj novaĵoj:

En la lingvoj Portugala, Hispana, Angla, Franca, Pola, Norvega, Itala

kaj Korea.

Aldonitaj prononcekzercoj: la lernanto nun povas registri sian prononcon kaj kompari kun la modelo;

Variaj voĉoj: nun 6 malsamaj voĉoj estas uzataj por ĝeneralaj frazoj kaj prononcaj modeloj;

Aldonitaj sondosieroj por la lecionoj 5 kaj 6, kaj por la tekstoj kaj spritaĵoj de la lecionoj 4 ĝis 11;

Reviziita frazaro;

Nova bildo por la ĉefa menuo;

Estos disponebla speciala versio por kursgvidaj servoj: por ekstudi novan lecionon, la lernanto bezonos pasvorton. Interesitoj kontaktu min pri tio.

Por elŝuti la programon vizitu la paĝon:

<http://www.cursodeEsperanto.com.br/eo/>  
aŭ sekvu la subajn ligilojn:

<http://www.cursodeEsperanto.com.br/kurso.exe>  
(9,2 MB) — kompleta elŝuto

Poparta elŝuto:

<http://www.cursodeEsperanto.com.br/kurso2.exe>  
(2 MB) — ĉefa programo, kun la tradukoj kaj ĝeneralaj dosieroj.

La subaj programoj instalas la son-dosierojn de la koncernaj lecionoj. Ili ne estas elŝutendaj, se vi volas nur rigardeti la programon. Se vi tamen volas kontroli la funkciadon de la tuta programo, vi devas ilin elŝuti.

<http://www.cursodeEsperanto.com.br/lec01.exe>  
(1.36 MB)

<http://www.cursodeEsperanto.com.br/lec02.exe>  
(0.6 MB)

<http://www.cursodeEsperanto.com.br/lec03.exe>  
(0.7 MB)

<http://www.cursodeEsperanto.com.br/lec04.exe>  
(0.8 MB)

<http://www.cursodeEsperanto.com.br/lec05.exe>  
(0.7 MB)

<http://www.cursodeEsperanto.com.br/lec06.exe>  
(1.1 MB)

• **La organo de INA** (Internacia Naturkuraca Asocio) sub la titolo *Naturkurado 2000* estas senpage legebla kiel elektronika libro ĉe:

[http://www.mz-verlag.de/INA/Publikationen/INA\\_jarlibro\\_2000\\_online.pdf](http://www.mz-verlag.de/INA/Publikationen/INA_jarlibro_2000_online.pdf)

[Laŭ *Eventoj*]

• **Diskutlisto de Pasporta Servo:** Estas starigita diskutgrupo pri Pasporta Servo ĉe:

<http://www.egroups.com/group/PasportaServo>  
Ĝi celas kunigi ne nur gastigantojn sed ankaŭ gastojn kaj interesiĝantojn. Kvankam ne jam vaste anoncanta, ĝi jam nun enhavas kelkajn membrojn. Estonte, ĝi estos la ĉefa reta informkanalo por PS (apud la hejmpaĝo). Ankaŭ ekzistas aparta grupo por la Landaj Organizantoj.

Aliĝi oni povas ankaŭ per simpla

malplena retpoŝta mesaĝo al:

[PasportaServo-subscribe@egroups.com](mailto:PasportaServo-subscribe@egroups.com)

La poste ricevotan (anglalingvan) mesaĝon oni devas senŝanĝe simple resendi. Tiu resendo konfirmas, ke vere estas vi kiu aliĝas. [Laŭ *Eventoj*]

• **EspeReto:** Anstataŭ la malnova samnoma listo ĉe [tripod.com](http://tripod.com) estas kreita retlisto EspeReto, kiu okupiĝas pri Esperantolingvaj retaj listoj, funkcias kiel anonco de novaj E-retpaĝoj, servoj. Aliĝo ĉe:

[espereto-subscribe@egroups.com](mailto:espereto-subscribe@egroups.com)

• **Eŭropa Bulteno**, la retbulteno de EEU (Eŭropa Esperanto-Unio) estas retpoŝte sendata senpage en nurteksta formato al ĉiu kiu petas ĝin al la adreso [u.broccatelli@tiscalinet.it](mailto:u.broccatelli@tiscalinet.it). Krome ĝi estas sendata en papera versio al ĉiuj kiuj kontribuas al EEU per mondonaco de almenaŭ 20 eŭroj jare. Nun ĝi estas ankaŭ legebla en formato PDF en la TTT-ejo de EEU: <http://lingvo.org/eo.html>

fonto: ret-info



POR RIDIGI  
VIN



*Lingva problemeto*

Instruistino de la Franca lingvo klarigis al sia klaso ke substantivojn en la Franca, malkiel en Esperanto, oni gramatike difinas kiel viraj aŭ inaj. “Domo” en la franca estas ina (*la maison*). “Krajono” en la franca estas vira (*le crayon*). Scivolema knabo demandis:

“Kiun genron havas komputilo?” La instruistino ne sciis. Do, por ekzerco ŝi dividis la klason en du grupojn, sufiĉe konvene laŭ sekso, kaj petis, ke ili decidu, ĉu “komputilo” devas esti vira aŭ ina substantivo. Am-

baŭ grupoj devis doni kvar kialojn por siaj rekomendoj.

La grupo de viroj decidis ke komputiloj certe devus havi inan genron (“*une ordinateur*”) ĉar:

1. Neniu krom ili kaj la kreinto komprenas ilian internan logikon.

2. La propra lingvo, kiun ili uzas por komuniki inter si, estas nekomprenebla al ĉiuj aliaj.

3. Eĉ la plej etajn erarojn ili konservas en la longdaŭra memorio por ebla posta retrovo.

4. Tuj post kiam oni promese ligas sin al unu, oni konstatas, ke oni elspezas duonon de la salajro por akcesoraĵoj.

Tamen la grupo de virinoj konkludis ke komputiloj devas havi viran genron (“*un ordinateur*”) ĉar:

1. Por kapti ilian atenton, oni devas doni al ili la povon.

2. Ili havas grandajn datumarojn sed ili ankoraŭ estas senciaj.

3. Ili devas povi helpi vin solvi problemojn, sed duontempe ili mem ja estas la problemoj.

4. Tuj post kiam oni promese ligas sin al unu, oni konstatas ke se oni nur iom atendus, oni jam povus akiri pli bonan modelon.

[el **Inter Ni** n-ro 177  
pere de *Eventoj*]

---


## 1a Konferenco de Verduloj Tutmondaj Global Greens 2001 (14,15,16 Aprilo) de Jennifer Bishop

Mem ĉeesti tian eventon ĉiam estas pli ekscite ol nur rigardi oficialajn kontribuojn televide kaj radie. Pro la titolo, pro la fakto ke ĝi estas la unua, kaj pro fervora konsterniĝo pri la stato de la naturmedio de nia belega planedo, mi volis nepre ĉeesti kaj utiligi la oportunon starigi Esperanto-budon laŭ la jam antaŭlonge ricevita peto de Manfred Westermayer, prezidanto de AVE (Asocio de Verdulaj Esperantistoj).

Impona evento ĉe la impona kongresejo de Kanbero, oni ne povis mistrafi ĉe la enirejo okulfrapan unu-personan manifestacion kontraŭ milito kaj polucio sur nia planedo.

Kvankam ne videbla, prezentante sin poste la manifestaciinto, Benny Zabel, surprizis nin informinte ke li naskiĝis en Bialistoko kaj ke liaj gepatroj parolas Esperante.

Interne troviĝis la kutima inform-



Sandor Horvath kaj Jennifer Bishop

giĉeto, T-ĉemiz-vendejoj kaj multaj budoj de diversaj federacioj de verdaj partioj en nia regiono ekz. Vietnamo, Koreo kaj Nov-Zelando. Iom post iom dum la tri tagoj aperis stoketoj da flugfolioj por forpreni kaj ĉiutage la informilo *Spinifex* kun Esperanto-kontribuo, sed nur en numero 3.

Sandor Horvath el Suda Aŭstralio estris la agadon kaj aranĝis la spacon

dum Brian Currie, mi, kaj Alan kunhelpis. Surprize, estis finfine Alan kiu deĵoris plejmulte, utiligante la tempon por sia propra profesia legado dum Sandor, Brian kaj mi ĉeestis la prelegojn kaj laborgrupojn pri komunikado kaj lingvo/kulturo. Vizitintoj al la budo inkluzivis Francan Esperantiston el Provinco kaj la filon de tre konata Gregoire Maertens el Belgio.

Pli ol 700 partoprenantoj el surpriza nombro da landoj, 70, ĝuis la oportunon pridiskuti la plej gravajn temojn por la estonteco de nia planedo, samtempe kreante specialan ĉarton aprobitan de la plejmulto de oficialaj delegitoj. La provĉarto haveblas en Esperanto kaj espereble aperos baldaŭ ankaŭ la fina verkiĝo por nia pripensado.

Kompreneble, por ni estis plej interese la prilaborado de interpretadbezonoj. Laboregis interpretistoj en almenaŭ ses lingvoj reprezentataj. Ili sidis supre malantaŭ vitraĵo. La laborlingvoj estis la Angla kaj Franca sed necesis traduki ankaŭ el la Franca. Tre afabla virino faris sian eblon por kontentigi la lekciistojn kaj la aŭskultantojn sed ne eblis sen rimarki ĝenon de unu flanko aŭ la alia.

Malantaŭ la kulisoj ni, Esperantistoj, faris nian eblon por informi pri Esperanto ĉe laborgrupoj, sed pli efike allogante oficialajn delegitojn subskribi rezolucion. Nur je la fino mi konsciiĝis ke rezolucioj estas akceptataj nur de oficialaj delegitoj. Ne gravas, almenaŭ eblis atentigi la homojn pri bona alternativo al fuŝa tradukado.

En la lasta tago estas anoncite ke la venonta konferenco okazos en Afriko iam antaŭ 2006. Jen defio al ni

subteni kaj instigi niajn amikojn en Afriko ne nur daŭrigi la bonan laboron sed agi sur oficiala tereno. Ni esperu por Esperanto kaj por la bezonoplena homaro. □

## Unua internacia kongreso de verdaj partioj

### Impresoj de Sandor Horvath

Dum pasko, Jenny & Alan Bishop, Brian Currie kaj mi partoprenis en la unua internacia kongreso de verdaj partioj en Kanberro, Aŭstralio. Preskaŭ 800 ĉeestis. Duono estis eleksterlande. Ĝi estis vere ekscita evento. Kial?

- La kongreso decidis tutmondan ĉarton, kiu estos la bazo por venonta laboro de verduloj. (Vizitu: <http://www.global.greens.org.au> <http://www.comlink.apc.org/ave> )

- La kongreso kreis la “verdan ŝirmilon”, por protekti verdulojn en landoj, kie simple esti verda estigas grandan danĝeron (ekz. Kolombio).

- La kongreso kreis Tutmondan Verdan Reton (Global Greens Network) por kunordigi la laboron de la verdaj organizoj tra la mondo.

Por mi persone la kulminoj estis jenaj:

Simple ekscii ke ekzistas verdaj partioj en diversaj, foraj landoj: Ukrainio, Bulgario, El Salvadoro, Mongolio,...fakte, pli ol 70 verdaj partioj kaj asocioj estis reprezentitaj.

Aŭdi pri spertoj, luktoj, problemoj, sukcesoj de fremdlandaj verduloj. Precipe la delegitoj de “malaltsalajraj landoj” malfermis miajn okulojn pri la efiko de la tutmondiĝo sur iliaj landoj.



Simple aŭdi de Wangari Maathi de Kenio kiom da problemoj ŝi spertis por ricevi vizon por Aŭstralio memorigis min ke mi vivas en la privilegia parto de la mondo.

Estis bone aŭdi ke multaj verduloj estas en diversaj parlamentoj tra la mondo, kaj ekscii ke ili klopodas plibonigi la medion kaj la vivon de multaj homoj.

La vespermanĝo okazis en la granda festosalo de la nova parlamento. La manĝaĵoj estis tute organikaj.

Post la kongreso mi sentis min vigligita kaj energiplena.

Kompreneble, ni varbis por Esperanto. Ni havis budon kaj ni babilis kun multe da verduloj. Kiel kutime, nur kelkaj homoj opinias ke Esperanto taŭgus kiel kominikilo inter verduloj.

Ne gravas, almenaŭ ni enmetis la ideon pri la neŭtrala lingvo en la kapojn de kelkaj verduloj.

Sandor Horvath

([sandor.horvath@unisa.edu.au](mailto:sandor.horvath@unisa.edu.au))

## La tutmonda verdula konferenco — aprilo 2001 raportas Brian Currie

Ni ekvojaĝis el Blackheath frumatene paskan sabaton, kaj iris laŭ la “malantaŭa” vojo okcidente de la montaro. La vojo estas tre bela, precipe la descendo al Rivero Abercrombie kaj reascendo al la altebenaĵo. Sed ni forgesis kiel kruda estas parto de tiu vojo, kaj ni alvenis Kanberon sufiĉe skuitaj kaj kun aŭto kovrita per blanka polvo.

Nia unua celo estis bakejo en Chifley, kie oni vendas ion sufiĉe similan al “normala” pano (nome: Ĉeĥa), ke, laŭlegende, oni alvenadas el la tuta Aŭstralio nur por aĉeti ĝin. Kun stoko por ni mem kaj geamikoj,

ni direktis nin al hotelo meze de la urbo.

Jen la unua eraro. Sciinte ke la konferenco, antaŭe aranĝita por la malnova parlamento, estas translokigita al la Konferenca centro en la urbo, mi ŝanĝis la mendon ĉe Hotelo Macquarie al (nenomota) loĝloko en la urbocentro. Kiam mi provis starigi la aŭton antaŭ ĝi dum la minuto necesa por malŝarĝi, ni ricevis nur kolektan hupadon de busŝoforo — sed jam tro malfrue! Kial neniu avertis nin?

Ni promenis al la konferenco, kiu estis provizita per amaso da bonaj manĝaĵoj. Refreŝiĝinte ni irus supren kaj trovis la Esperanto-standon, jam kapable establita de Jenny kaj Alan Bishop el Melburno. Baldaŭ reaperis Sandor Horvath el Adelajdo, kiu energie strebadis aranĝi rezolucion pri neŭtrala interlingvo, kaj laborgrupon pri lingva diverseco.

La konferenco konsistis el sinkvajak plensesioj (kun ĉiuj en granda halo) kaj laborgrupoj, por kiuj ekzistis kunvenejoj por diskuti ĝis dek aŭ dekkvin temojn. Mi baldaŭ konvinkigis ke la plensesioj estas malŝparo de tempo: unu post alia “gvidanto” parolis, kaj ĉiuj aliaj nur sidis mute en mallumo kaj aŭskultis. Oni povus same informiĝi hejme, pli komforte. Sed la proponitaj laborgrupoj estis tre diversaj kaj mi sentis min vere ŝirata, kiujn partopreni.

Baldaŭ montriĝis ke la organizado de laborgrupoj estis tre hazarda. Unuavice, ĉio okazis laŭ la famaĉa “verda horaro”, tio estas, tre malfrue. Eĉ horon post la komencotempo, partopren(u)ntoj vagadis inter eblaj kunvenlokoj, sekvante paperpecetojn kiuj avizis ŝanĝon al pli preferata ejo, kelkaj el ili tre kreivaj. Ankaŭ, ĉar mankis sufiĉe da oficialaj kunvenejoj

por la proponitaj temoj, iu burokrate kunŝovis kelkajn. Tiel la unua grupo pri lingva diverseco trovis sin samloke kun tiu pri informado, kio rezultis en malmulte da reciproka interkompreno.

Vespere ni partoprenis gvidatan trarigardon de la nova parlamentejo. Nia gvidanto estis Senatano Bob Brown, kiu amuze kaj sprite rakontis pri siaj spertoj tie kiel la ununura Verda senatano. La konstruaĵo estas kovrita interne per belaj marmoraj kaj lignoj, sed ĉio aspektis al mi kvaŝaŭ algluita al framo baze tre simila al iu flughavena halo; neniu aŭtentika arĥitektura gusto estas evidenta.


Ni revenis al nia hotelo, esperante bonan dormon post longa tago. Cetero mi komencis terni kaj larmi, kaŭze de iu akirita rinito. Sed monotonaj basnotoj el proksima noktoklubo draŝis la silenton ĝis la tria horo. Sekvis ebria kriaĉado en la stratoj ĝis, je la sepa, alvenis stratpurigistoj armitaj per benzinmotoraj balailoj, kaj tiel enkondukis novan tagon.

Dimanĉon matene okazis la dezirata laborgrupo pri lingva diverseco, ĉifoje iom pli feliĉe kunŝovita kun

unu pri kultura diverseco. Jenny parolis tre elokvente pri sia tre sukcesa uzado de Esperanto kiel enkonduko al lernado de la Japana lingvo, kaj okazis vigla diskuto pri la uzado de Esperanto kiel portilo de internacia kulturo.

Malgraŭ ajna manko de ajna lingvopolitiko, la konferencaj diskutoj iris pli-malpli glate preskaŭ tute en la Angla lingvo. Efektive, tri kvaronoj da partoprenantoj estis el Angle parolantaj landoj, kun la plej grandaj alilingvaj grupoj parolantaj la Japanan, Korean, Germanan, kaj Francan. Onidire okazis nur unu rekta kolizio, kiam unu Franco plendegis pri manko de tradukisto, ĉar li insistis paroli France. Vere estus multe pli facile kompreni kelkajn kiuj luktis esprimi sin rekte en la Angla malgraŭ nesufiĉa scio, se taŭga tradukisto ekzistus. Aŭdiĝis kelkaj plendoj pri Anglalingva dominado de la verda movado. Estos interese vidi kio okazos ĉe venontaj similaj kongresoj en neangle parolantaj landoj.

[El *Telopeo*] □



## De la sekretario de AEA



Esperanto-Asocio de Britio vendas, malmultekoste, kurson, kiu estas en la Angla: *Esperanto – The International Language: A Complete Textbook* de W.J. Downes (1982), akademiano. Mi volonte sendigos ekzempleron al vi por nur ĉirkaŭ AU\$10.00. En ĝi estas 25 lecionoj, ekzemploj kaj revizaj ekzercoj.

Ankaŭ la Asocio sendis al mi specimenon de tre utila libreto kun (40 minuta) sonkasedo *Liza kaj Paŭlo* de

Reto Rossetti, 5a eldono 1994. Se vi volus aĉeti, la prezo estas ĉirkaŭ AU\$12.50, kaj mi liverigos ĝin rekte al vi. La kasedo enhavas kantojn kaj poemojn; jen unu de G.E.Maura.

### Maro

Maro, zorga dommastrino,  
faldas re kaj re, sen fino,  
susure silkajn ondojn.

<http://www.Esperanto.demon.co.uk/>

### Klubo de Hobarto

Pro malsaneco D-ro Dudley Parkin-son ekzigis kiel prezidanto de la Klubo de Hobarto. La nova prezidanto estas Eric Bantick. Li estas bona Esperantisto kaj efektive li estis prezidanto antaŭ multaj jaroj.

### Altiras Launcestono

Ĉu Launceston estos la loko por la Somerkurso 2003? Kun la helpo de la Tasmania Kongresoficejo mi preparis propondokumenton kiu estas nun en la manoj de la estraro de AEA. Nia malavara ŝtato provizos AU\$500 por ke mi povu iri al Perto kaj prezenti al eventualaj delegitoj la

Tasmanian Somerkursaron kiel la venontan.

### Deziras korespondi

Mi esperas trovi amikojn pere de via ĵurnalo, por korespondi per e-poŝto. Se vi povos anonci mian retadreson en via ĵurnalo, mi estos tre danka. Mi estas 37 jaraĝa viro. Mi loĝas en Vladivostok. Miaj intereso estas lingvoj, ĉefe Esperanto, libroj, arto kaj homa komunikado. Se iu volos korespondi kun mi, mia retadreso estas: [<joulin@mail.ru>](mailto:joulin@mail.ru)

Amike via Andrew



## Recenzas via redaktoro



**Georgo Handzlik: *Ni tostuj la verdan fortunon...*** Kompakta disko kun 19 kantoj. Bielsko-Biella: Eldonejo KLEKS, 2000. Takso: 1

La komponinto/kantanto skribis pri si: “Mi komencis kanti Esperante en 1977, mi prezentis miajn baladojn en preskaŭ ĉiuj landoj de Eŭropo ...Antaŭ tri jaroj mi iom revenis al kantado.”

Recenzi kantodiskon ĉiam estas tre riska entrepreno, ĉar ŝajne muzikpreferoj estas nekutime diversaj interniaj legantoj. Tamen mi kuraĝe diros miajn opiniojn pri ĉi tiu disko:

Hadzlik verkis, kantas, kaj perigitare akompanas sin en ĉi tiu disko. Kelkfoje akompanas lin ankaŭ piano kaj/aŭ violono. Lia voĉo estas iom raŭka, kaj komentis unu aŭskultanto: vere ĝenas ke li ne agordas sian kantadon<sup>1</sup>. Eblas ke al folkkantantoj tio ne multe gravas.

Grandparte, sed neniel senescepte, la kantoj temas pri la Esperanta movado. Ankaŭ sociaj temoj pri kantigaĵas, kiel kutimas en folkanta muziko.

La prononco ne estas ĉiam klara, kaj la akcentado ofte malĝustas (por sekvi la melodion...). Domaĝe, la disko ne akompanas presita teksto de la vortoj, tiel ke ne estas ĉiam eble kompreni la kantadon. Pro tio, kaj la tre raŭk-grata kvalito de la voĉo, al mi ne plaĉas la disko. Eble al aliaj personoj ĝi ja plaĉos. — db

**Vittorio Russo: *Danteskaj itineroj.*** Tr./red. Nicolini Rossi. Napoli: Napola Esperanto-Asocio, 2001. 85p., broŝ. Takso: 2

Teksto destinita por deklamado/publika enscenejigo. Vittorio Russo selektis el *La Dia Komedio* kaj aliaj verkaĵoj de Dante tekstojn spirite aŭtobiografiajn, aranĝitajn en du grupoj: “La aŭtobiografia itinero” kaj “La etika-politika itinero”; inter la

<sup>1</sup> “Sing in tune” — red.

selektitaj teksteroj deklamanto/horo informas kaj diskutas pri la eventoj en la vivo de Dante ilustrataj de la poeziaĵoj.

Personoj kiujn speciale interesas Dante verŝajne trovos ĉi tiun verkon utila. Domaĝe, la kvalito de la poeziaj tradukaĵoj varias, ĉar multaj el la tekstoj devis esti speciale tradukitaj por ĉi tiu eldono, sed la poezia talento de la tradukintoj estas kelkfoje tre malalta. Do kiu legas la verkon por konatiĝi kun la poezio de Dante seniluziiĝos; sed kiel prihistoriaĵo ĝi havas valoron. □

**Eliza Orzeszko: *Marta*.** Tr. Ludoviko Lazaro Zamenhof. Kvina eldono. Bielsko-Bieła: Eldonejo KLEKS, 2000. 256p., bind. Takso: (Enhavo: 🗨️🗨️🗨️); lingvaĵo: 🍷🍷🍷.

Eliza Orzeszko (1841-1910) estis tre populara romanisto Pola. Ŝiaj verkoj temis pri la bezono por sociaj reformoj. En ĉi tiu romano la specifa reformo necesa estis la rajtigado de virinoj. Ŝi priskribas la tiaman situacion ĉi tiel:

Viro riĉa kaj samtempe honesta ne faras maljustaĵon nek ofendon al viro malriĉa; se li iam tion faras, tio ĵetas makulon sur lian karakteron kaj elmetas lin al puno de publika malaprobo. Sed mi ne est[a]s viro, mi est[a]s virino; kaj ofendo aŭ maljustaĵo rilate virinon...estas afero tute alia ol ofendo aŭ maljustaĵo rilate viron.

Marta, la ĉefrolanto en la romano, estas juna vidvino senmona sed kun kvarjara filineto. Neniam trejnita por iu ajn laboro, ŝi devas subteni sin kaj sian infanon, sed neniu akceptas dungi ŝin. Ĉie kie ŝi petas laboron, ŝi ricevas la respondon "Nur viroj rajtas fari tian laboron". Lingvan instru-

adon rajtas fari virino, sed Marta ne estas sufiĉe kompentata por tio. Muzikon ŝi iam studis, sed tiu scio estas jam tro rusta en ŝi. Por edukiĝi necesas havi monon. Sur la paĝoj de la romano ni vidas ŝin iri de laborejo al laborejo, ĉiam malsukcese. Fine la infano malsaniĝas pro malvarmeo kaj manko de taŭga nutrado, kaj Marta mem (forkurante post epizodo en kiu ŝi ŝtelis monon) proakcidente mortas.

La aŭtoro regalas nin per multnombraj prediketoj pri la maljusteco kontraŭ virinoj en la aktuala socio.

Domaĝe, la teksto en ĉi tiu nova eldono de *Marta* enhavas tre multajn kopierarojn, kiuj ofte ĝenas (aŭ eĉ malebligas) la komprenon.

Zamenhof publikigis ĉi tiun tradukon en 1910. □

**Günter Grass: *La lada tamburo*.** Tr. Tomasz Chmielik. Eldonejo KLEKS, 2000. 534., bind. Takso: 🍷🍷.

La Germana originalo, *Die Blechtrommel*, unue aperis en 1959, do antaŭ 42 jaroj.

Temas pri tre fikcia, kaj tre surrealistika rakonto, biografio de knabo, Oskaro, kiu kiam trijara decidis ne plu kreski, do restis nano dum sia tuta vivo.

Oskaro verkas sian biografion dum li estas paciento en psikiatria hospitalo, kie li restas pro kondamniĝo kiel freneza murdinto. Lia frenezeco estas montrata per lia stranga sinesprimado, sed ĝi paralelas la frenezecon kiu kaptis Germanion dum la Hitlera epoko kaj la tujpostmilita epoko.

Al Oskaro estis donacita, je lia tria naskiĝtago, porinfana ludilo, malgranda lada tamburo. Li trovis ke per tamburado li povas ŝanĝi la emociojn, kaj (poste) la pensojn de la aŭdantoj; kaj li ankaŭ havis mirindan talenton

frakasi vitron per sia voĉo.

Dum la postaj jaroj Oskaro restis aspekte trijara infano, kaj per tiu ŝajnigo sukcesis plenumi siajn planojn, ĉar kiu suspektus trijarulon? Ni travivas liajn bizarajn karierojn, kaj partoprenas en liaj bizaraj spertoj.

*La lada tambureto* estis siaepoke furorlibro. Nuntempe ĝi perdis multe da siaj ironio kaj satirado; kaj tre multaj aludoj al personoj kaj eventoj Germanaj dum la '40-oj kaj '50-oj ne estas facile komprenataj de negermanaj nuntempaj legantoj. La tradukinto ne klarigas la plej multajn aludojn.

Tamen, la romano povus ankoraŭ esti tre ĝuata, se la traduko estus pli lerta. Gramatike kaj leksikologie la tradukinto bone plenumis sian taskon, sed li konservis multajn germanismojn — i.a., li tre strange uzas la vorton “la” laŭ tre miskompreniga (ĉu germandevena?) maniero; kaj lia frazkonstruado ofte tre perpleksigas.

Mi ne konas la Germanan originalon, do mi ne scias kiom surrealisma estis la esprimo en ĝi — verŝajne ĝi estis tre surrealisma. Sed tro laŭvorta transmeto en Esperanton malplezurigas la legadon. Specimena, kaj tre tipa, alineo:

Ankoraŭ unu semajnon kuŝis Herberto, sur la seĝo pensante, mi ne povis elteni, li ne lasis tenti sin al rakontoj pri la cikatroj kaj al vizitado de montrofenestroj, kiuj promesis ĉion. Mi montris komprenon por mia amiko, mi permesis al li ĝui restaĵon de tiu ĉagreno, mi vizitis horloĝiston Laubschad kaj horloĝojn, kiuj voris la tempon, mi esploris ankoraŭfoje ŝancojn ĉe muzikisto Meyn, li tamen ne metis eĉ glaseton al la buŝo kaj nur rapidis

kun trumpeto, sekvante la takton de la orkestro de SA, elegante kaj kuraĝe li vestis sin, dum kvar katoj, memoraĵo el la ebriema, sed tre muzikema tempo, iom post iom, ĉar mizere nutrataj, kadukiĝis. Kaj Matzerathon, kiu — dum mia panjo estis vivanta — drinkis nur en akompano de kamaradoj, mi vidis iam je malfrua horo, kun vitra rigardo ĉe la malgrandaj glasoj da vodko. La turnis paĝojn de la fotoalbumo, li provis same, kiel nun mi, revivigi mian kompatindan panjon el kvaranguloj, malgrandaj, sed pli-malpli bone eksponitaj, li iom ploris, kaj ĉirkaŭ la noktomezo li agordiĝis, li alparolis tiam Hitleron aŭ Beethovenon, ankoraŭ pendantajn vidalvide, turnante sin al ili per la familiara “ci”, kaj ŝajne li aŭdis respondon de la geniulo, kiu estis surda, kaj dume la sobra “gvidanto” silentis, ĉar Matzerath, malgranda ebriema ĉelestro, ne meritis la providencon.

Post plurfoja relego mi sukcesis deĉifri la sencon de tiu alineo:

“Herberto kuŝis sur la seĝo, pensante, dum plia semajno. Mi ne povis elteni tion; li ne estis tentebila per rakontoj pri liaj cikatroj, aŭ per vizitado al butikaj montrofenestroj kiuj promesas ĉion. Mi montris komprenon por mia amiko. Mi permesis ke li plene ĝuu sian ĉagrenon.

Mi vizitis la horloĝiston Laubschad, kun liaj horloĝoj kiuj voras la tempon.

Mi esploris denove miajn ŝancojn ĉe la muzikisto Meyn. Li tamen ne metis eĉ glaseton [da drinkaĵo] al la buŝo. Li nur okupadis sin per trumpeto, sekvante

la takton de la orkestro de SA [*Sturmabteilung*, privata armeo de Hitler]. Li vestis sin elegante kaj kuraĝe. Dume liaj kvar katoj, restintaj el lia ebriplena sed tre muzikema tempo, iom post iom kadukiĝis pro mizera nutrado.

Kaj mi vidis iam, je malfrua horo, Mazerathon, kiu — dum mia panjo estis vivanta — drinkis nur en akompano de kamaradoj. Sed nun mi vidis lin kun vitra rigardo, kaj kun malgrandaj glasoj da vodko. Li turnadis la paĝojn de fotoalbumo. Same kiel mi, li provis revivigi mian kompatindan [mortintan] panjon, per la malgrandaj kvarangulaj fotoj plimalpli bone aranĝitaj. Li iom

ploris, sed ĉirkaŭ la noktomezo li retranskribigis Li alparolis tiam Hitleron aŭ Beethovenon, kies portretoj ankoraŭ pendis vid-alvide, per la familiara “ci”. Ŝajne li aŭdis respondon de la geniulo kiu estis surda [= Beethoven]; dume, la sobra “gvidanto” [*führer*] silentis, ĉar Matzerath, malgranda ebriema ĉelestro, ne meritis tian favoron [t.e. ke al li respondus la *führer*].”

Mi ne proponas tion kiel tradukon, nur kiel eksplikoprovon, ĉar mi ne konas la Germanan originalon. Ke mi bezonis tian eksplikon indikas ke la tradukinto ne kompatis la kompatindajn negermanojn kiuj penas kompreni la tekston. □

---

## Zamenhof kaj la lingvaĵo en *Marta* Notoj de Donald Broadribb

Traleĝante la romanon *Marta* por ĝin recenzi, mi faris aron da notoj pri la stilo kaj lingvuzo de Zamenhof — ĉar temas pri relative granda romano, kaj ĝin traduki postulis tre kleran manipulado de nia lingvo. Kaj kiu pli lertis ol Zamenhof mem kiam temas pri ekspluatado de la riĉoj de la Esperanta lingvo?

En 1910 Esperanto estis 23-jara, kaj jam estis eldonita en ĝi granda kvanto da verkoj, inkluzive de literaturaj. Ni rajtas esperi trovi en la traduko de *Marta* spertan kaj lertan utiligon de la lingvo — kaj tiu espero estas plene pravigita de la traduko.

Unue, estas interese ke la vortostoko uzita de Zamenhof en la traduko konsistis preskaŭ ekskluzive el radikoj jam firme radikiĝintaj en Esperanto. Preskaŭ plene mankas “ne-

ologismoj”. Mirige, malgraŭ tiu utiligado de malgranda vortostoko (malpli ol kvarmil radikoj), Zamenhof sukcesis doni tre artkvalitan literaturan tradukon. Nur unufoje ŝajnis al mi ke li trostreĉis sian aplikadon de la radikoj, nome en la frazo “ŝi puŝfalis sur la ŝtuparo”, kie la vorto “stumblis” vere estis necesa. Ja ne temis pri ia ajn puŝo...

Feliĉe Zamenhof ne anticipis la logikadon de postaj gramatikistoj, do li utiligis grandan amason da vortoformoj kiujn postaj gramatikistoj energie malaprobis. ekzemple:

*oni antaŭ ĉio esplorus la komercaĵonklerecon, kiun ŝi alportas* p.86 [Ĉu kopieraro? Mi kredas ke ne. Kvankam postaj skribantoj verŝajne preferus “*komercaĵo-klerecon*”, Za-

menhof ne uzis streketojn tiel en ĉi tiu libro; kaj ĉi tiaj vortkombinaĵoj ankaŭ aliloke troviĝas en la traduko.]

*eĥo de longepasintaĵa rememoro* p.88

*konvenus al stato de bonhaveco* p.95

*la grado de bonstato de la laboristo* p.96

*multekostaj* p.101

*postesigno* p.107

*sindevige* p.109

*blanka muslina ŝovkurteno* p.133

*Ĝi havis sur si apenaŭ videblajn, sed densajn fadenetojn-sulketojn* p.184 [Denove: ĉu kopieraro? Mi kredas ke ne; ne temas pri “fadenetojn-sulketojn”, t.e. fadenetojn + sulketojn, sed la sulketoj kiujn estigas fadenetoj.. ]

*ŝiaj flaveblondaj haroj* p.183

*Delikata bonodoro de oranĝeriaj kreskaĵoj* p.183

*kia do bonfaro tio estas?* p.190

*alkutimiĝinta al lukso kaj ne-*

*nionfarado* p.195

Estas evidente ke Zamenhof, plenuzante la riĉon de nia lingvo ne interesiĝis pri gramatikaj reguloj kia “nur -o- rajtas aperi inter du radikoj en kunmetita vorto” (kontraŭe: *komercaĵonklerecon, longepasintaĵa, multekostaj, postesigno, sindevige, fadenetojn-sulketojn, flaveblondaj, nionfarado*); nek ke oni ne rajtas kunmeti vorton el adjektiva + substantiva radikoj (kontraŭe: *bonhaveco, bonstato, bonodoro, bonfaro*), nek ke verba radiko + substantiva radiko estas malpermesendaj (kontraŭe: *ŝovkurteno*). Tute male, li libere kaj lerte faris radikokunmetaĵojn por sin esprimi. Tiurilate, multaj postaj gramatikistoj volas multe malpliriĉigi nian lingvon.

Se Zamenhof ne majstris la “spiriton de la lingvo”, do kiu?

Tial, kvankam literature la verko ne tre plaĉas (tro da malkaŝaj predikado kaj propagandado), mi nepre forte rekomendas ĝin kiel stilgvidilon tre imitindan ankoraŭ nun. □



## EL LA REGIONOJ



**Qld:** Rolf Ahrens aktivas en 100.3 Bay FM (PO Box 1003, Cleveland Qld 4163). Ni ricevis de li magnetofonbendon de elsendo 22-11-00, en kiu li aŭdigis la Esperantan version de la kanto *Hieraŭ* de John Lennon. Rolf serĉas pli da Esperanta muziko por disaŭdigo per 100.3 Bay FM.

**Tas:** John Gallagher raportas pri no-

va Esperanto-kurso per la Csehmetodo, en Westbury, Tasmanio. Li sendis la ĉisuban foton:



Bahaanoj en Esperanto-kurso en Westbury

## NOV-ZELANDA ESPERANTO- KONGRESO 2002

Informas Donald Rogers

La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio aranĝas kvar-tagan Esperantan kongreson en Wellington dum Pasko 2002 (29a de marto ĝis 1a de aprilo). La ĉefa instruisto por la kongreso estos Terezja Kapista, el Jugoslavio. Kij partoprenis la lastan somerlern-ejon en Aŭstralio, tiuj jam konas ŝin. Ĉi tiu kongreso ne estos enloĝada afero, sed ni povos aranĝi diversajn specojn de loĝado por partoprenantoj: moteloj, hejma restado ĉe loka Esperantisto, junulara gastejo, ktp. Simplaj manĝaĵoj estos haveblaj ĉe la kongresejo — la lernejo ĉe Island Bay.

Esperantistoj en Wellington ankaŭ aranĝas kvin-tagan kurson por komencantoj. Ĝi okazos ekde la 23a ĝis la 27a de marto 2002. Terezja Kapista ankaŭ instruos tie. Ŝi estas spertulo pri la Cseh-metodo. Kvankam Pasko de 2002 ŝajne estas for en la estonteco, iuj eble jam planas por tiu semajnfino. Pro tio ni nun informas pri la kongreso, kiu okazos je tempo nekutima por niaj kongresoj. Se ĝi interesas vin bonvolu sciigi nin aŭ retpoŝte ([esperanto-nz@geocities.com](mailto:esperanto-nz@geocities.com)) aŭ poŝte (Box 8140, Symonds Street, Auckland, New Zealand), aŭ fakse (+64-9-579 6087). □

## Esperantaj historiaĵoj Aŭstraliaj

Betty Broadbent, en Viktorio, kolektas memoraĵojn kaj fotojn Esperantajn pri Aŭstralio por arigi en historia kajero, ekde la unua AEA-kunveno en 1905 estrita de John Booth. Ĝi an-

kaŭ enhavas la kunvenon de la revivigita AEA en 1938 estritan de Joab Eljot. Se iu havas taŭgan aldonon (foton, dokumenton, ks.) al la kajero bonvolu kontakti Betty-n. Adreso: 63 Kennedy Rd, Somers Vic 3927. E-poŝte: [henryb@peninsula.hotkey.net.au](mailto:henryb@peninsula.hotkey.net.au).

[Laŭ *Telopeco*]

---

Nevintra Kanto  
(el privata raporto de lingvisto  
partopreninta en muzikkurso  
Sudazia)

“Unu speco de kanto kiun ni kantas estas tiel dolĉa ke ni neniam kantas ĝin dum la vintro.”

Ĉu ŝajnas strange al vi? Certe al mi, kiam mi aŭdis ĝin, do mi ĝojis kiam la preleganto klarigis. Li, kun 24 aliaj parolantoj de nenaciaj lingvoj en Suda Azio, partoprenis en muzik-trejnseminario. Ses lingvogrupoj partoprenis en la du semajnoj da trejnado gvidata de du vizitantaj etnomuzikistoj, du tre intensaj semajnoj, mi diru. Instruado alternis kun laborgrupoj, kaj kun prezentadoj dum kiu eblis montri al la aliaj partoprenantoj kiel ĉiu lingvoteamo aplikis la lecionon al la propra kulturo. Mi ne povis ĉeesti ĉiujn sesiojn (Anglalingvaj kantoj ne estis permesataj!) sed mi penis ĉeesti dum 2-3 horoj ĉiutage. Dum la prezentadoj post la leciono pri indiĝenaj kantospecoj mi lernis kial dolĉeco kaj vintro estas sinkontraŭantaj. La junulo klarigis ke kiam tiu specifa kantospeco estas kantata, ĉiu haltigas sian agadon kaj venas aŭskulti. Eĉ la bestoj, birdoj, insektoj alvenas. Sed se iuj el ili devus tradormi la vintromon, la povruoj mortus pro frostiĝo. Tial tia kanto neniam kantiĝas dum la vintro. □



## Odlo Bokserp Raportas

La ĉisekva artikoleto aperis en la ĵurnalo *Sunday Times* de Perto antaŭ kelkaj semajnoj:

Nuntempe oni ne povas iri ien ajn sen aŭdi porteblan telefonon, inkluzive de en la kamparo, kie la




Laŭrobirdoj

birdoj imitas ĝenajn alvoksignalojn.

Almenaŭ kvin specoj de Aŭstraliaj indiĝenaj birdoj imitas la sonojn de porteblaj telefonoj, surprizante kamparmarŝantojn kaj birdorigardantojn kiuj penas eskapi de la urbosonoj.


Drongoj [*Dicrurus bracteatus*], laŭrobirdoj, menuroj, kaj kelkaj specoj de papagoj aldonas la telefonsignalojn al siaj kantostokoj.



Menuroj

Greg Czechura, birdeksperto de la Kvinlanda Muzeo diris ke birdoj jam delonge imitas homoriginajn sonojn.

“Esence, ili imitas sonojn kiujn ili aŭdas proksime, kaj ju pli grandan varion de voksignaloj de virbirdo, des pli verŝajne li allogas kunulinojn,” diris S-ro Czechura.



Kakatuo

Rigardintoj de la birdofilmoj faritaj de David Attenborough eble memoras lian epizodon pri Aŭstralia birdo kiu imitis la sonon de fotilo.

Proksime al la domo de nia Redaktoro aŭdeblas, iom trompe, ne nur la sono de portebla telefono, sed ankaŭ de krianta bebo — ambaŭ sonoj venas de la arbosuproj — de kakatuo.

Laŭ alia ĵurnalartikolo:

Se la mondo havus nur 100 loĝantojn, kun la aktualaj proporcioj:

- 57 loĝus en Azio
- 21 loĝus en Eŭropo
- 14 loĝus en la okcidenta hemisfero
- 08 loĝus en Afriko
- 52 estus ineksaj, 48 virseksaj
- 30 estus blankuloj, 70 neblankaj
- 89 estus aliseksamaj, 11 samseksamaj
- 6 Usonanoj posedus duonon de la riĉo de la mondo
- 70 ne kapablus legi
- 50 estus neadekvate nutrataj
- 1 estus tuj mortonta
- 1 estus ĵus naskita
- 1 estus edukita en universitato
- 1 posedus komputilon. □

## AVENTURO EN NEPALO 2002

★ Esperanto sub la ombro de Everesto ★

LA 4A INTERNACIA HIMALAJA RENKONTIGO 2002



(26a de februaro - 8a de marto 2002)



Everesto 8848 m

Organizo de  
**Nepala Esperanto-Asocio**  
Katmanduo Nepalo

### LA PROGRAMO

26-a de februaro: b onvenigo kaj enhoteliĝo  
27-a de februaro: vizito al vidindaĵoj de Pasupati, Boudha kaj Baktapuro  
28-a de februaro: lugo al Lukla (2850 m) kaj marŝo ĝis Fakding (2640 m)  
1-a de marto: marŝo de Fakding ĝis Namče (3446 m)  
2-a de marto: marŝo de Namče (3446 m) ĝis Tengboče (3967 m) (Everesto)  
3-a de marto: de Namče/Tengboče, reveno ĝis Ghat (2815m)  
4-a de marto: marŝo de Ghat ĝis Lukla  
5-a de marto: lugo al Katmanduo, vizito al Patano  
6-a de marto: p erfloas rajdo sur la rivero Trisuli  
7-a de marto: vizito al Svajambhu, libera tago, internacia vespero  
8-a de marto: foriro

Kotizo ĝis 30-9-2001 ekde 1-10-2001 ekde 1-1-2002

675	725	750
625	675	700

La menciita kotizo validas por dulita ĉambro kaj se vi deziras unuilitan ĉambro, bv. aldoni 50 usonajn dolarojn al ĝi. La kotizo inkluzivas manĝadon kaj loĝadon dum la tuta periodo.

Bonvolu sendi la aliĝilon al la 4a IHR-komitato kun samtempa pago. Kiel dato de la aliĝo validas la alvendato de la plena pago.

### Nepala Esperanto-Asocio

P.O.Box:10518, Kathmandu, Nepal

Tel: 977-1-413754 (atenton s-ro L.P.Agnihotri)

Tel: 977-1-359132 (atenton s-ro Posh Raj Subedi)

Fax: 977-1-227230 aŭ 977-1-227222

www.esperanto.com.np

E mail: sosierra@wlink.com.np

E mail: nrb@ntc.net.np



## POR RIDIGI VIN



Usonano, Rusiano kaj Baratano parolis pri kiu havas la plej altan teknologion.

Por montri, Usonano fabrikis tre maldikegan vitran kablono.

Rusiano prenis ĝin kaj drilis truon laŭ ĝia longeco kaj faris ĝin kava.

Hindiano prenis ĝin kaj la Usonano kaj la Rusiano ne sciis kion li faris. Fine, sub mikroskopo ili rigardis ĝin kaj trovis ke la Hindiano presis "Farita en Hinda Unio" sur ĝin!

*Sendita de Aniruddha Banhatti*



## POR RIDIGI VIN



Knabo : Paĉjo, kiel vi havigis min ?  
Patro : La Dio donis vin al ni kiam ni preĝis.

Knabo : Kaj kiel mia fratino Rupa?

Patro : Ni trovis ŝin en unu templo.

Knabo : Stranga! Ĉu vi kaj Panjo ne scias kiel fiki?

*Sendita de Aniruddha Banhatti*

**LA AŬSTRALIA KAJ LA  
NOV-ZELANDA  
ESPERANTO-ASOCIOJ**

**Aŭstralia Esperanto-Asocio:**

<http://www.esperanto.org.au/>

**Prezidanto:** *Jennifer Bishop*, 39 Hill St, Hawthorn Vic 3122.

☎ 03 9818 7358 (AH), 03 9905 2806 (BH); 📠: 03 9905 3668 (BH).

[esperanto@education.monash.edu.au](mailto:esperanto@education.monash.edu.au)

**Vicprezidantoj:**

*Franciska Toubale*, 1 Marne Rd, Mt Evelyn Vic 3796.

[franciska@bigpond.com](mailto:franciska@bigpond.com)

*Hazel Green*, 44 Toowoomba Rd, Oakey Qld 4401.

[hazgreen@tmba.design.net.au](mailto:hazgreen@tmba.design.net.au)

**Sekretario:** *John Gallagher*, 81 Francis St, Brighton SA 5048.

[abcetc@ozemail.com](mailto:abcetc@ozemail.com)

**Vicsekretario:** *Bob Felby*, 6 Dorset St, Semaphore Park SA 5019.

☎ (08) 8242 1460.

[esperantobob@picknowl.com.au](mailto:esperantobob@picknowl.com.au)

**Kasisto:** *Stephen Pitney*, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122.

[Pitney@Cybernetint.net](mailto:Pitney@Cybernetint.net)

**Vickasisto:** *Frank Braham*, 5 Marriot Rd, Moorabbin Vic 3189.

[fbraham@aol.com](mailto:fbraham@aol.com)

**Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:**

**Prezidanto:** *Bradley McDonald*, PO Box 12 103, Auckland 1135.

☎ 09 579 4767, 📠 09 579 1070.

[neelam@voyager.co.nz](mailto:neelam@voyager.co.nz)

**Sekretario:** *Howard Gravatt* PO Box 8140, Symonds Street, Auckland 1035, New Zealand.

☎ 09 626 6129.

[hgravatt@ihug.co.nz](mailto:hgravatt@ihug.co.nz)

**Kasisto:** *Jackie Fox*, PO Box 8140, Symonds Street, Auckland 1035.

☎ 09 817 8244.

[brianandjackie@abztrak.co.nz](mailto:brianandjackie@abztrak.co.nz)

**KOTIZOJ:**

**Aŭstralia Esperanto-Asocio:**

AŬ\$30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por familiano[j] ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon al la Kasisto de AEA: Stephen Pitney, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122.

**Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:**

<http://www.geocities.com/esperanto-nz>

NZ\$40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

**Unuopaj ekzempleroj de Esperanto sub la Suda Kruco:** Por membroj, AŬ\$3 + poŝtsendkosto; por nemembroj, \$4.25 + poŝtsendkosto. Menu de la Libroservo de AEA.

**Abonoj ekster Aŭstralazio:** €23.70, pagu al la konto aeal-w de la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

**Artikoloj** de aŭtoroj nomitaj estas © 2001 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas © 2001 de la Aŭstralia kaj la Novzelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

**Ĉi tiu numero** de *ESK* estas kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb per iMac DV SE, la programo uzita estas FrameMaker 5.5. La tiparo uzita estas New Century Schoolbook. La reteldono estas preparata per Power Mac 7200, kaj Acrobat 4.0.

**Specialaj kunlaborantoj:**

*Odlo Bokserp*, I.N.K. K.R.A.J.O.N. K.R.E.T  
Prezidanto de la Internacia Asocio de Presmisionistoj

*Verla Doloro*, L.M.K.

[lia multsuferta kontrolanto]



## FROM THE AEA SECRETARY



The Esperanto Association of Britain have an audio cassette and accompanying book to encourage the study of Esperanto. Reto Rossetti is the author, and the title is *Liza kaj Paŭlo*. It's the 5th edition, published in 1994 under the auspices of UEA and Group 5. The tape (40 min.) also has some poetry and music. They sent me a sample copy and in my humble opinion it works, to stimulate study that

is. I can order copies from them at around AU\$12.50 delivered to you, for the book and cassette.

For around AU\$10.00 they also have *Esperanto – The International Language: A Complete Textbook* (1982) by W.J. Downes, member of the Esperanto Language Academy. A neat little book, 200 pages containing 25 lessons, supplements and revision exercises.

<http://www.esperanto.demon.co.uk/>

### **Hobart club:**

Because of illness, D. Dudley Parkinson has resigned his role as President. We wish him a speedy recovery. The new president is Mr. Eric Bantick, an Esperantist who was president many years ago.

### **“Altiras Laŭncestono” – Launceston attracts.**

Could Launceston be the location for the 2003 summer school? The Tasmanian Convention Bureau has assisted me in putting forward a bid document that is now in the hands of the board of the Australian Esperanto Association. Our generous state will also provide me with \$500 to set up a booth at the Perth 2002 conference and promote the Tasmanian conference to potential delegates.

---

## **Why is Esperanto Similar to a Bicycle or Why is English Similar to a Car by Sandor Horvath**

Many car drivers believe in a few myths with which they justify their continuing use of the motor car. A very similar line of thought is heard when it

comes to justifying English at international meetings (including Global Greens). Here are the common lines:

(1) Everyone (a) speaks English, (b) has a car

*Really, we know neither of them is true.*

(2) Practically everyone at this conference (a) speaks English, (b) came by car

*Often said in English at a place difficult to get to without a car.*

(3) It's a lot easier to (a) speak English, (b) just use a car.

*Often said to justify their money/time expense of having (a) learned English, (b) bought a car.*

(4) We have so many other problems. Why worry about this one?

(5) Of course, it would be a lot better and fairer (a) for everyone to speak a neutral language, (b) ride bicycles (or use public transport), but people will *never* do that.

(6) Short summary: I don't want to make the effort to (a) learn a new language. (b) ride a bicycle (catch a train). (a) English, (b) cars are just too convenient.

Sandor Horvath is one of the Editors of the S.A. Greens Magazine. He'd like to see less Greens drive cars and future Global Greens Conferences held in Esperanto.

---

## OUR CONTEST RESULTS

Four readers took part in our translation contest this time: John Gallagher, Hazel Green, Bradley Kendall, and J.D. Whitmore.

**Ms:** This is a genuine translation problem, because Esperanto has not developed any equivalent. The suggestion *S-ino / F-ino* is probably as good as any.

**convenient:** This is a familiar trouble maker for English speaking users of Esperanto. The Esperanto verb *konveni*, which looks suspiciously like the English word "convenient," actually means "to be suitable, proper". For "it is convenient" a good translation would be *estas oportune*.

**which:** certainly one of the greatest problems for English speaking users of Esperanto. As a basic rule of thumb, "which" is *kiu* and "what" is *kio*, though colloquial English is not as consistent as Esperanto in making this distinction.

**available:** Some form of the verb *dispon-* is probably best. It is an odd verb, in that it basically means “to have available”. So “is available” might be *estas disponebla*, or, of course, simply *haveblas*. *Akireblas* might also be used.

**to correct:** “to correct someone” is *korekti*. “To correct something” is either *korekti* or *ĝustigi* depending on the nuance intended.

**would welcome:** *bonvenigus*.

**challenge:** *defio* really means “defiance”, which seems rather strong for “welcome *the challenge* to provide a good Esperanto version.” *Postulo* means “a demand”. In the context, *tasko* seems more appropriate to the meaning.

Only Hazel Green’s translation was completely free of grammatical errors.

---

## FOR THE BEGINNER

by Donald Broadribb

Those Pesky Verbs: “Would”

Perhaps no single verb gives more trouble to beginning students of Esperanto than the English verb “would”. It seems to have a vast number of meanings in English, and textbooks rarely give it much attention.

**(1) Conditional: would...if/but** By far most common is the sort of phrase that runs “I would send him an e-mail, but he never reads his e-mail.” This is fairly straightforward in Esperanto: *Mi sendus al li e-poŝtaĵon, sed li neniam legas siajn e-poŝtaĵojn*. Often a second “would” is implied in English: “I would send him an e-mail, if he [would] read his -e-mail” (where we usually leave out the second “would”). In Esperanto: *Mi sendus al li e-poŝtaĵon, se li legus siajn e-poŝtaĵojn*.

**(2) Past time: = Used to** The second use of “would” in English often traps even otherwise good writers of Esperanto who come from an English speaking background. “When I was a child, I *would* always visit my friend after school while waiting for my parents to come home from work.” In Esperanto *-ad-* or some such verb as *kutimis* expresses this meaning: *Kiam mi estis infano, mi kutimis ĉiam viziti mian amikon post la lernejo, dum mi atendis la revenon de miaj gepatroj el sia laborado*. Here, according to the stylistic nuance desired, the sentence could also run *...mi vizitadis mian amikon...* Often simply *...mi vizitis mian amikon...* is enough, since the word “always”/ĉiam gives the main idea anyway.

**(3) Future time:** A third frequent use of “would” presents a third trap for the beginning student of Esperanto. In English, when we are speaking of the past, we normally express a relative future by using the word “would”. In other words, we talk about the future relative to a past event, as in “he told me he **would** send you the cheque tomorrow.” What this means is that he told me that he was going to send the cheque tomorrow. His actual words were probably “I’ll send you the cheque tomorrow”. In Esperanto, we use the ordinary *-os*, which indicates a future action, for this: *Li diris al mi ke li **sendos** al vi la ĉekon morgaŭ.*

**(4) Emphasis:** Often in English we use the word “would” not as a verb at all, but simply as a word that gives emphasis, often sarcastic, ironic, or with some other nuance.

For example:

SARCASTIC: “You said you’d write a report of the conference, but then you **would** go and spoil it, **wouldn’t** you!” In Esperanto such emphasis is given by use of some appropriate extra word: *Vi promesis verki raporton pri la konferenco, tamen vi decidis fuŝi ĝin!*

SARCASTIC: “You **would** say that, **wouldn’t** you?” *Vi ja dirus tion, ĉu ne?*

SURPRISE: “Who **would** have thought it? [i.e. foreseen it]” *Vere, kiu antaŭvidus tion?*

SURPRISE: “Who **would** have thought it? [i.e. believed it]” *Vere, kiu kredus tion?* [Or perhaps: *Vere, kiu supozus tion?*]

DESCRIPTIVE: “He’s a **would be** hero” [He wishes he were a hero] *Li celas fariĝi heroo.*

DESCRIPTIVE: “He’s a **would be** hero” [He mistakenly believes he’s a hero, he imagines himself to be a hero] *Li imagas ke li estas heroo.*

REQUEST: “If you **would** just ask, I’d willingly take you there” *Nur petu, kaj volonte mi veturigos vin tien.*

TENTATIVE QUESTION: “**Would** you know a shop that sells this sort of button?” *Ĉu vi konas butikon kie oni vendas ĉi tian butonon?*

POLITE REQUEST: “**Would** you lend me your book, please?” *Ĉu vi bonvolos prunti al mi vian libron?*

ARCHAIC: I WISH THAT: “**Would** that he were here!” *Ke li nur estu ĉi tie!*

If any readers have suggestions for other uses of “would” in English, please send them to the editor at <[sudakruco@sudakruco.org](mailto:sudakruco@sudakruco.org)>.